

EL POPOLA ĈINIO

中國報道

6 1981





Legado

Sane Kresku la Infanoj

Fotoj de WANG SHOULIANG

kaj LI CHUNGENG



Por civilizi la infanojn, nun iras en diversaj lokoj de Ĉinio aktivadoj de "civilizeco, ĝentileco, pureco, disciplineo kaj bonmoraleco" kaj de "beleco en animo, lingvo, konduto kaj medio". Ĉu la familioj, lernejoj aŭ la socio ĉiuj klopodas por kulturi la infanojn en novajn homojn klerigitajn kaj sanajn.


Ekskurso al pitoreskejo



Por beligi la medion de la lernejo



Helpo al kripla kunlernantino en vizito al lernejo



Eksperimentado

Helpo al geonkloj en purigo de aŭtobusoj



Farado de delikataj lanternoj



Danco ĉirkaŭ kaŭĉuka fadeno estas ludo ŝatata de la infanoj.



Muntado de radioricevilo



Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

SUR LA KOVRILO:

Si pentras printempajn florojn
Foto de WANG
SHOULIANG

SUR LA DORSKOVRILO:

Ŝtofpecaj bildoj
Faritaj de HANG FAJI
kaj CHEN MIN

KOLORAJ SERIOJ:

Sane kresku la infanoj
Kantoj kaj dancoj de kazaĥoj
Pentraĵoj de gejunuloj
Antikvaj vidindaĵoj de Quanzhou

NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

La unua granda alt-fluksa atoma
reaktoro konstruita en Ĉinio
Tera arbaro
Ĉina spira gimnastiko
Por amuzi infanojn

Enhavo

Ĝojo de la kamparanoj de Lankao	2
Reformo de ruĝa grundo en suda Ĉinio	4
KURANTAJ AFEROJ	7
Magia bisturio en la mano de profesorino Dong Shufen	8
NIA KULTIVEJO:	
Fremdlandaj esperantistoj kaj la ĉina Esperanto-movado	11
Pri profesoro Lu Jianbo	14
Eternan pacon al nia kunlaborantino	16
Forpasis f-ino Marie Bonafous	16
ESP-NOVAĴOJ	17
Gazeto por geknaboj	19
Karaj infanoj (kanto)	22
KORESPONDI DÉZIRAS	23
Pentraĵoj de gejunuloj	24
VIDINDAJ LOKOJ: Antikvaĵoj de Quanzhou	26
Ruĝa trapo (Popola rakonto)	30
Ĉinaj fabloj	33
Taras Sevĉenko	34
Testamento (poemo)	35
KULTURAJ NOTOJ	37
Spira gimnastiko kaj ĝia saniga efiko	38
SPORTO	40
Mia vivo en la templo Zhebong	41
Nuklea energio — elekto de la mondo	43
KALEJDOSKOPO	36,46
AMIKECO:	
Muziko revekis nian amikecon	48
Per Esperanto por ĉina-pollanda amikeco	50
HISTORIAJ OBJEKTOJ: Rama-piteka kranio trovita en Ĉinio	50
INTER NI	52

Generala distribuanto: Esperanta
Sekcio de GUOJI SHUDIAN
(Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj)
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Ĝojo de la Kamparanoj de Lankao

PRINTEMPE de 1981 mi vizitis Lankao-gubernion, Henan-provinco, en la meza baseno de la Flava Rivero. Antaŭe tiu loko multe suferis de atako de sablovento kaj serioza salalkaliĝo de kampoj. En n-ro 4 de EPC, 1966, ni detale raportis, sub la titolo "Modelo por

Guberniaj Partisekretarioj", pri sterileco kaj malriĉeco de tiu loko. Kia ŝanĝiĝo al ĝi okazis hodiaŭ?

Guberniestro Xu Xuezhong donis al mi intervjuon. De li mi informiĝis, ke post Liberiĝo la tieaj popolanoj faris refor-

madon de kampoj kontraŭ sablo kaj tera salalkaliĝo, terkulturis ternuksojn, kotonon kaj grenon kaj ĉiujare per tio kontribuis al la ŝtato. Tamen de post 1958 la erara agrikultura politiko damaĝis aktivecon de la kamparanoj, tiel ke en 1962 la grena produktokvanto de la tuta gubernio ege malpliĝis kompare kun tiu de 1956. Post tio kamarado Jiao Yulu (Giau Julu), kiel gubernia partisekretario, venis tien. Sub lia gvidado la lokanoj faris multajn klopodojn dum mallonga tempo kaj levis la produktokvanton de ĉefaj agrikulturaj plantaĵoj al tiu de 1956. Sed post nelonge komenciĝis la kultura revolucio. De tiam ĝia stato malboniĝis jaron post jaro. La loĝantoj sin vivtenis per greno kaj subvencio donitaj de la ŝtato kaj faris produktadon per ŝtata kredito. Ĉiujare nemalmultaj popolanoj devigite forkuris aliloken por trovi vivrimedojn.

Mi volis informiĝi pri la stato de tiu gubernio en la lastaj du jaroj, tial mi petis kamaradon Xu, kiu laboris tie longtempe, rakonti al mi pri tio. "Vi mem vizitu la kamparon, kaj pri tio certe rakontos al vi komunumanoj," kun rideto li respondis.

En la sekvanta tago mi venis al la produkta brigado Leixin-

Nova ekonomia politiko plenigis la grenejojn de kamparanoj.



zhuang de la Batou-a Popola Komunumo ĉe la Flava Rivero. Lei Zhongjie, sekretario de la partia filio de la brigado, estas mezalta 40-jarulo kun sunbruna vizaĝo. Li rakontis al mi pri la ŝanĝiĝo de tiu brigado. En tiu brigado ĉiu komunumano meznombre posedis 0.3 hektaron da kampo. Tamen en la 20 jaroj de 1958 ĝis 1978 ĉiu komunumano ĉiujare konsumis meznombre 100 kg. da greno provizita de la ŝtato. Ekde 1979 la brigado plenumis la "sistemon de produkta respondeco"* kaj agrikulturajn ekonomiajn politikojn de "terkulturado laŭ la konkretaj kondiĉoj de kampoj kaj ampleksa disvolvo de ekonomio". Tiu-jare ili unuafoje vendis grenon al la ŝtato. En 1980 la komunumanoj ricevis meznombre po 130 juanojn kaj 210 kg. da tritiko, krom alispecaj grenoj.

"Jen estas nur la ciferoj en la konto," emfazis Lei, "efektive oni ricevis pli multe. Ĉar la enspezo de la familiaj flankokupoj ne estas enkalkulita. La kvantoj de rikoltaĵoj de la familioj mem respondecaj pri la produktado sur certaj kampoj estas anoncigitaj de ili mem." Li diris, ke iu 8-membra familio enspezis nur 1,200 juanojn en la brigada konto, sed fakte ĝia enspezo jam superis 3,000 juanojn.

Koncerne la kolektivitan ekonomion, Lei diris, ke en la pasinteco ne nur la individuo, sed ankaŭ la kolektivo estis malriĉaj. Sed nun ili ambaŭ estas riĉaj. Li diris plue, ke dum la 30 jaroj de post la Liberiĝo tiu brigado aĉetis nur unu traktoron eĉ per la mono prunteprenita de la ŝtato. Tamen sole en la pasinta jaro ĝi aĉetis 15 traktorojn, 8 rikoltmaŝinojn kaj 8 semmaŝinojn.

Kun gaja humoro li diris, ke en la kuranta jaro la produkta brigado aĉetos 4 grandajn traktorojn por ke ĉiu produkta taĉmento posedu traktorojn grandan, mezgrandajn kaj malgrandajn, kaj konstruos lernejan etaĝdomon kaj staplejon.

Forlasinte la brigadan oficejon, ni iris en la domon de iu komunumano. La mastro Rong Bingkuan estas 30-jarulo. En la centra ĉambro ni vidis grandan radioricevilon sur la tablo. Lia edzino estis kudranta ĉe stebilo por siaj infanoj novajn vestojn por la Printempa Festo. Ambaŭflanke de la tablo staras po unu nova sofo. La mastro invitis min rigardi lian risortlinton en alia ĉambro. Krome, li intencas aĉeti televidilon aŭtune.

Lia familio havas kvar membrojn, inter kiuj du laboras. Mi pensis en mi, ke eble li estas la plej riĉa en tiu brigado. Tial, forlasinte lian domon, mi eniris en iun malnovan korton. La mastro estas nomata Lei Zhengwen, ĉ. 50-jara. El 11 membroj de lia familio du laboras.

"Ĉu la greno sufiĉas?" mi demandis.

"Kial ne?" li kontraŭdiris, "nun la nova politiko estas efektivigita. Nu, rigardu!" li montris la internan ĉambron.

Jen estas lia grenejo, dekstre stapliĝas ĉ. 1,500 kg. da tritiko kaj maldekstre ternuksoj.

Elirinte el tiu domo, mi vizitis ankoraŭ dekkelkajn domojn. Mi rimarkis ke ĉiu familio, ĉu kun multaj laborantoj, aŭ kun malmultaj, havas grandajn staplojn de tritiko, sojfabo kaj ternuksoj kaj porkaĵojn.

Posttagmeze en la brigado Yangzhuan ni vizitis 6 parojn

da junaj novgeedzoj. Ĉiu el ili posedas meblaron, brakhorloĝojn, biciklon, radioricevilon kaj stebilon.

Jam falis vespera krepusko, kiam ni revenis al la gubernia urbo. Tiam mi subite rememoris iun okazintaĵon: Iutage antaŭ la disfalo de la kvarpersona bando en 1976, mi prenis manĝon en iu restoracio de la urbo Changsha de Hunan-provinco. Ĵus levante la bovlon, mi rimarkis unu nigran maneton. Apude staris virino kun 7-8-jara knabino. Ŝi parolis kun akcento de Henan-provinco. Mi demandis ŝin, de kiu vilaĝo ŝi venis. Ŝi respondis ke ŝi venis el Quantou-brigado de Lankao-gubernio.

"Kiel statas Quantou-brigado?" mi demandis la respondeculon de la gubernia partikomitato.

"Ĝiaj naturaj kondiĉoj estas tro malbonaj. De 1958 ĝis 1978 oni dekkelkfoje transpostenigis la brigadajn respondeculojn, el kiuj naŭ estis ŝtataj oficistoj. Foje eĉ iu vicestro de la Organiza Departemento de la Gubernia Partikomitato kumulis la sekretarion de ĝia partia filio. Tamen pro efektivigo de neĝustaj politikoj neniuj el ili solvis la problemon de vivo de la komunumanoj. Hodiaŭ tiu brigado ankoraŭ estas la plej malriĉa en la gubernio!"

"Ni vizitu ĝin morgaŭ, ĉu bone?" mi diris al li.

Ambaŭflanke de la 15-kilometra ŝoseo de la gubernia urbo al Quantou-brigado staras tegolaj domoj kaj malofte videblas kabanoj. Dum la 20-minuta veturado ni renkontis pli ol 20 parojn da novgeedzoj. Tiulokaj

(Daŭrigata sur p. 23)

Reformo de Ruĝa Grundo en Suda Ĉinio

EN la suda parto de Ĉinio troviĝas vasta sterila ruĝa grundo acideca kaj glueca, kaj sur tiu grundo nun iras “verda revolucio”.

La areo de la ruĝa grundo en suda Ĉinio konsistigas 12% de la totala areo de Ĉinio kaj egalas al tiu de du Francioj. Sur ĝi oni povas kulturi nur acid- kaj steril-rezistajn plantojn, kiel arakido, tritiko, batato, rafano kaj kolzo, kies produktokvanto estas tre malalta. De la fino de la kvindekaj jaroj de la kuranta jarcento ĉinaj kamparanoj ekspluatis 670,000 hektarojn da ruĝa grundo, plibonigis du milionojn da hektaroj da sterilaj


ruĝgrundaj kampoj kun malalta produkto kaj plantis 6,700,000 hektarojn da arboj sur ruĝgrundaj montoj. Oni reformas ruĝan grundon per malkompaktigo de grundo, irigaciado kaj precipe sterkado de granda kvanto da organika sterko. En la regionoj de ruĝa grundo, oni povas vidi, ke sur vastaj kampoj kreskas diversaj plantaĵoj por verda sterko.

La ruĝa grundo de Ĉinio sin trovas ĉefe en 12 dense loĝataj provincoj sude de Changjiang (Jangzi)-rivero. Precipe en Jiangxi (Gianghi)-provinco, la areo de la ruĝa grundo konsistigas 40% de la totala areo de la

provinco, la areo de ruĝgrundaj akvokampoj—50% de la totala areo de la akvokampoj, kaj la areo de la ruĝgrundaj senakvaj kampoj—65% de tiu de la senakva tero de la provinco.

En 1958, Jiangxi-provinco komencis grandskalan reformon al la ruĝa grundo. Nun 400,000 hektaroj da ruĝgrundaj rizkampoj reformiĝis kaj ties hektara produktokvanto altiĝis de 1.5 al 3.7 tunoj. En la gubernioj Jinxian, Yujiang, Ji-an kaj Xiajiang estas 80,000 hektaroj da ruĝgrundaj rizkampoj, kies hektara produktokvanto superis 6 tunojn, kaj tiu de iuj kampoj eĉ atingis 7.5 tunojn. Sur la ruĝa grundo

Baita-kandlo de Yujiang en la ruĝgrunda regiono



Ruĝgrunda tero



ili ankaŭ kulturis industriajn plantojn. La areo de ruĝgrundaj kotonkampoj konsistigas 70% de la totala areo de la kotonkampoj de la provinco, la areo de ruĝgrundaj teĝardenoj konsistigas 50% de la totala areo de la teĝardenoj de la provinco, kaj la areo de ruĝgrundaj fruktoĝardenoj ĉiam pli vastiĝas. Krome, oni plantis 670,000 hektarojn da sekvojoj kaj pinoj sur kalvaj montoj. La sekvojoj, kiujn la Yichun-a Forsta Instituto plantis sur ruĝa grundo antaŭ kvin jaroj, meznombro altas je 5.54 metroj kun trunko dika je dek centimetroj.

Fama ĉina grundologo prof. Huang Yeluo diris: "La ruĝa grundo jam fariĝis grava grunda riĉfonto por Ĉinio." Huang en sia juneco lernis en Japanio, Usono kaj Germanio kaj revenis al la patrolando en 1939. Li diris al mi humure: "Nia reformo kaj utiligo de la ruĝa grundo signifas verdan revolucion sur la ruĝa dezerto."

Koni kaj reformi la ruĝan grundon estas longa malfacila




Frukto-ĝardeno sur ruĝgrunda tero

tasko. Jinxian-gubernio de Jiangxi-provinco servis kiel ekzemplo tiurilate. La areo de ĝia ruĝgrunda agraro konsistigas pli ol 95% de la totala areo de ĝia agraro. En la fino de la kvindekaj jaroj, en tiu gubernio oni povis kulturis nur plantojn rezistantajn al acideco kaj sterileco sur la ruĝa grundo, kaj sojfabon kaj sezamon sur kompare fekunda ruĝa grundo, sed ili ĉiam donis malaltan produktokvanton.

En la komenco de la sesdekaj jaroj, tieaj kamparanoj komencis reformi la ruĝan grundon. Ili disŝutis kalkan pulvoron sur la ruĝan grundon por mildigi ĝian acidecon, uzis fosforan sterkon, kiam al ĝi mankis fosforo, kaj multe plugis por malkompaktigi la teron. Ĉio tio efikis nur portempe al plantoj, sed ne povis radikale ŝanĝi la naturon de la ruĝa grundo. Poste, la kamparanoj de la komunumoj Xiabu kaj Baiwei de tiu gubernio kulturis

Teĝardeno sur ruĝgrunda tero



astragalon (*Astragalus sinicus*) sur la ruĝa grundo. Post 2-3 jaroj ĝia supra tavolo fekunda dikiĝis de 7-8 al 17-18 centimetroj. Tio pruvis, ke uzo de organika sterko estas bona rimedo por reformi la ruĝan grundon.

Nun, en Jinxian-gubernio la areo de la ruĝgrundaj agroj, sur kiuj oni kulturas plantojn por verda sterko, jam atingis pli ol 32,000 hektarojn. Ĝi konsistigas ĉ. 15% de la totala areo de la agraro de la gubernio. Por prepari pli da organika sterko, la kamparanoj de la gubernio kolektas herbojn somere kaj aŭtune kaj elfosas ŝlimon el laĝetoj vintre, kaj krome ili multe bredas porkojn. La uzo de organika sterko ne nur kontentigis la bezonon de plantoj por nitroĝeno, fosforo kaj kalio, sed ankaŭ akcelis formiĝon de grajna strukturo de grundo kaj altigis la povon de grundo konservi sterkon kaj akvon.

La Ruĝgrunda Instituto sub la Agronomia Akademio de Jiangxi-provinco pruvis, ke la entena kvanto de organikaj kombinaĵoj, nitroĝeno kaj fosforo de la ruĝgrundaj kampoj, sur kiuj oni kulturis verdsterkajn plantojn tri jarojn, multiĝis de 0.64%, 0.04% kaj 0.036% al 1.21%, 0.066% kaj 0.067% respektive.

Tamen aperis nova problemo. En sekaj tagoj verdsterkaj plantoj ne povis esti ĝustatempe semitaj kaj kortosterko en la kampoj ne povis esti plene dissolvita. Kelkfoje pluvego forportis plibonigitan surfacan grundon. Por solvi tiun problemon, Jinxian-gubernio konstruis en la pasintaj dek jaroj pli ol 7,600 grandajn kaj malgrandajn akvorezervejojn, 375 elektrajn irigaciajn kaj drenajn staciojn kaj pli ol 600

irigaciajn kanalojn kun totala longeco de pli ol 1,900 kilometroj. Dank' al tio, 80% de ĝiaj kampoj ne plu timas sekegecon kaj inundon, kaj en 1979 ĝia hektara produktokvanto de greno atingis 6 tunojn malgraŭ sekegeco.

Irigacio utilas al akumulo de organika substanco de la ruĝa grundo. La esploro de la Ruĝgrunda Instituto montris, ke la entena kvanto de organika substanco en la ruĝgrundaj akvokampoj, kiuj transformiĝis el senakvaj ruĝgrundaj kampoj antaŭ tri jaroj, estas je 0.53% pli multa ol tiu de la senakvaj ruĝgrundaj kampoj. La meznombra rapideco de akumulo de organika substanco en la ruĝgrundaj kampoj irigaciataj sep jarojn ĉiujare kreskas je 0.223% kaj ĝi estas duoblo de tiu de la senakvaj kampoj.

Oni devas kombini la reformon de la ruĝa grundo kun verdigo de dezerta montaro. Alie, kiam pluvegas, la plantojn kaj kampojn trafas montdiluvo. Pro

tio la tieaj kamparanoj plantas arbojn sur dezertaj montoj ĉiuj printempe kaj ĉiuaŭtune. Nun en la gubernio 80% de la dezertaj montoj estas kovritaj per pinoj, sekvojoj kaj mandarinarboj. Krome, oni ankaŭ fosis kanalon sur monto por konduki montdiluvon en drenan kanalon.

En la komenco de 1980, la Agrikultura Ministerio de Ĉinio okazigis kunvenon en Nanchang (Nanĉang), la ĉefurbo de Jiangxi-provinco, por resumi sperton de la reformo de ruĝa grundo en la pasintaj 20 jaroj. Specialistoj proponis, ke oni daŭre reformu 5,300,000 hektarojn da ruĝgrundaj kampoj kun malalta produktokvanto, plantu arbarojn por ligno kaj kreu frukto- kaj te-ĝardenojn sur 24,700,000 hektaroj da dezertaj montoj kaj disvolvu brutobredadon sur 67,000,000 hektaroj da montdeklivoj kun herboj.

Se oni senĉese klopodos, la grandioza plano pri reformo de la ruĝa grundo certe efektiviĝos.

Traktoro plugas ruĝgrundan teron.





5,700,000 TURISTOJ AL ĈINIO EN 1980

En 1980 Ĉinio akceptis 5.7 milionojn da turistoj. Inter ili troviĝis eksterlandanoj, elmigrintaj ĉinoj kaj samlandanoj el Xianggang (Hongkong), Aomen (Aŭmen) kaj Taiwan (Tajvan), kiuj venis por rigardi ĉinajn historiajn vidindejojn, pitoreskejojn, viziti parencojn kaj amikojn kaj fari kulturan, sportan kaj sciencan interŝanĝon. Tiu nombro estis je 1.49 milionoj pli multa ol tiu en 1979.

Multaj turismaj lokoj de Ĉinio altiris grandan nombron da transmaraj gastoj per sia nova aspekto kaj plimultigitaj vidindaĵoj.

En la pasinteco la vojaĝantoj ĉefe vizitis vidindaĵojn lokojn kaj ĝuis artan prezentadon. Sed en la lasta jaro oni spicis ilian vojaĝon per fiŝhoko, biciklado, pikniko, tajĝiĉĵuan-gimnastiko, ĉinlingva ekzercado, studenta somerumo kaj budhista pilgrimado. La Komisiono de Fizika Kulturo kaj Sportoj organizis montogrimpan vojaĝon, akceptante 40 grupojn da tiuflankaj gastoj en la pasinta jaro.

EKFUNKCIIS KOMPUTERIZITA REZERVA SISTEMO

En la unua tagdeko de marto la Ĝenerala Administracio de Civila Aviado de Ĉinio uzis la nomitan sistemon por servi al pasaĝeroj de internaciaj aerlinioj. Ĝi ligiĝas rekte kun la komputerizitaj rezervaj centroj de diverslandaj aviadaj kompanioj por mallongigi tempon por peti informon kaj rezervon. Antaŭe la pasaĝero devis atendi eĉ kelkajn horojn por akiri bileton, sed nun nur kelkaj minutoj jam sufiĉas por tio.

ĈINIO FARIS KONTRAKTOJN PRI KONSTRUADO POR ALIAJ LANDOJ

La Ĉina Konstrua Kompanio jam finkonstruis por Nord-Jemeno, Kuvajto kaj aliaj landoj 21 konstruaĵojn, inkluzive hospitalojn, loĝdomojn, hotelojn kaj restoraciojn. Ili estas parto de 109 konstruaj kontraktoj faritaj de tiu kompanio kun aliaj landoj.

La kompanio estas tiucela entrepreno fondita en la komenco de 1979. Ĝi havas prospektoran kaj projektan trupojn, pli ol 100,000 konstruajn kaj muntajn laboristojn, kaj ankaŭ eminentajn arkitektojn kaj altnivelajn projektistojn.

17 CEMENTEJOJ KAJ PORCEMENTAJ MINEJOJ EN KONSTRUADO

Nun Ĉinio konstruas 14 grandajn kaj mezgrandajn cementejojn kaj 3 porcementajn minejojn. Post konstruado ili produktos pli ol 6.4 milionojn da tunoj da cemento kaj 2.7 milionojn da tunoj da kalkoŝtono ĉiujare.

La plej granda el ili estas la Orient-Hebei-a Cementejo kun ekipaĵoj importitaj el Japanio. Ĝi povos produkti 1.5 milionojn da tunoj da cemento ĉiujare.

El la 14 cementejoj 4 lokiĝas en la regionoj de nacimalplimulto.

146 PORKOMERCAJ FRIDEJOJ KONSTRUITAJ

En 1980 Ĉinio konstruis 146 porkomercajn fridejojn, el kiuj 16 havas kapaciton de pli ol 5,000 tunoj. Ilia entena kapablo atingis 189,000 tunojn.

SINTEZA FABRIKO POR TRAKTI MALPURAN AKVON

Antaŭ nelonge ekfunkciis la ekipaĵoj de la unuaperioda konstruo de la sinteza fabriko por trakti mal-

puran akvon sub la Jilin-a Kemi-industria Kompanio. Ĝi estas la plej granda el la tiucelaj fabrikoj de Ĉinio. Ĝi lokiĝas dek kilometrojn nordokcidente de la urbo Jilin (Gilin). Post kompletigo de la tuta konstruado la fabriko povos trakti 200,000 tunojn da malpura akvo ĉiutage. Ĉiuj ĝiaj ekipaĵoj estas fabrikitaj de Ĉinio. La prova funkciado montris, ke la kvalito de la konstruaĵo kaj ekipaĵoj atingis projektajn normojn.

JINGDEZHEN ĈIUJARE PRO- DUKTAS 90,000,000 BLU-DE- SEGNAJN PORCELANAJOJN

La ĉina porcelana urbo Jingdezhen ĉiujare liveras al la ŝtato 90,000,000 blu-desegnajn blankajn porcelanaĵojn kun rizgrajnaj diafanaj desegnoj. Tia bela kaj brila porcelanaĵo estas unu el la kvarspecaj renomaj porcelanaĵoj de Jingdezhen.

Inter tiuspecaj porcelanaĵoj estas diversaj manĝilaroj ĉinstilaj kaj eŭropstilaj, skribilaroj kaj servicoj por teo, vino kaj kafo, kaj ankaŭ diversaj elegantaj ĉambro-dekoracioj kaj metiartaĵoj. Tiuspecaj porcelanaĵoj eksponiĝis en pli ol 90 landoj kaj regionoj kaj havis grandan debiton. Pasintjare, tiaj porcelanaĵoj estis ekspoziciataj en San-Francisko, Ĉikago kaj Novjorko de Usono kaj trovis ŝaton de la usona popolo.

C. 3,000 FOIROJ EN ĈINAJ URBOJ

La foiroj en ĉinaj urboj havis novan kreskon. Ĝis nun ilia nombro atingis preskaŭ 3,000, kaj tiel formis vastan baznivelan foiroreton.

La meznombra monata vendovaloro de tiuj foiroj estas ĉ. 200 milionoj da juanoj, t. e. duoblo de tiu en 1979. Nun la urbaj foiroj liveras pli ol duonon de la kokoj, anasoj kaj anseroj bezonataj de la urbanoj. Multe kreskas ankaŭ la kvanto de bovajo, ŝafajo, porkaĵo, akvaj produktaĵoj, legomoj k.a.

Magia Bisturio en la Mano de Profesorino Dong Shufen

ESTIS en operaciejo de la Dua Dependa Hospitalo de la Xi-an-a Medicina Instituto. Lerte kaj aplombe operaciis ĉina fama specialistino Dong Shufen pri makzelo-formiga ĥirurgio. La unua helpanto en la operacio estis altstatura usona dentisto Nix. Li gastis ĉe la nomita instituto kaj esploris jam kelkajn tagojn en la hospitalo. Li elektis tiun kazon kaj petis labori kiel helpanto en la operacio.

La mola histo de la duona vango de la operaciato estis levita. La erare kunigitaj makzelo kaj zigomo estis disigitaj kaj la deviintaj ostoj estis remetitaj sur

la normalan situon. Post tio estis preciza truofarado, lerta fiksado kaj rapida kunkudro. La malfacilega operacio daŭris nur 3 horojn.

D-ro Nix estis mirigita de ŝia elstara tekniko montrita en operaciado. En ripozĉambro li demandis, kiom devis pagi la operaciato. Oni respondis, ke 20 juanoj sufiĉas. La usonano diris mire: "En Usono tia operacio pagigos dek aŭ dudek mil dolarojn." Li konsilis al la profesorino doni lecion kaj fari operacion en Usono. Li diris humore: "Mi estas milionulo en Usono, se vi estos en Usono, vi fariĝos centmilionulo."

Al la ŝerco de la usona amiko ŝi respondis: "Mi volas lerni en Usono, sed ne volas fariĝi centmilionulo. Servi al mia Patrio, al mia popolo, ja estas mia volo."

Ŝiaj kolegoj diris al ni, ke la operacio, kiun admiris la usona gastulo, tamen ne demonstris ŝian plej altan teknikon.

Ni rigardis grandformatajn fotoalbumojn. Ili fidele registris la procezojn de ŝanĝado de timigaj anormalaj vizaĝoj.

Iu foto montras 18-monatan knabon venintan de la gubernio Jingyang de Shaanxi. Lia nazo havis fendon en la mezo, kaj el la fendo elstaris la encefalo kaj meningo, kiuj formis grandan groteskan tumoron. Profesorino Dong fortranĉis al li la tumoron, kovris la fendon per bova molosto, kaj cetere aldonis al la bebo novan nazon. Alia foto montras la knabon post operacio. En la foto oni vidas nenion anormalan sur lia vizaĝo, sed male oni trovas ĝin aminda.

Jen foto de juna laboristino de Dandong de Liaoning-provinco. Maŝino forŝiris duonon de ŝia krania haŭto kaj duonkalvigis la kapon. Sed en alia foto oni vidis ke ŝi havas du dikajn harplektaĵojn. Profesorino Dong

La vizaĝo de pacientino antaŭ kaj post operacio




faris al ŝi operacion de grefto de kunhara haŭto. Post du operacioj la knabino reakiris sian belecon. Ŝi venis al la hospitalo kun tristo kaj ĝin forlasis kun ĝojo.

Kelkaj aliaj fotoj estas pli emociaj. Unu el ili montras 30-jaran virinon kun vizaĝo plena de variolmarkoj. Sed en aliaj fotoj ŝi tute ŝanĝiĝis: Sur ŝia glata kaj klarakontura vizaĝo oni povas vidi neniun variolmarkon. Per industria smirgradeto, profesorino Dong fojerefoje faris al ŝi frotadon kaj fine forigis la variolmarkojn. Kiam ŝi revenis al Pekino inter siajn kamaradinojn, ili eĉ ne rekonis ŝin kaj unu el ili demandis, kiun ŝi volas viziti.

La operacian teknikon profesorino Dong Shufen poluradis pli ol 30 jarojn. La rafiniteco de ŝia arto legitimis ŝian longtempan esploradon pri la makzeloformiga ĥirurgio.

Dong Shufen estis diplomita de la Medicina Universitato de Harbin. Poste ŝi laboris sinsekve en Changchun kaj Tianjin kiel kuracistino de stomatologia ĥirurgio. En la komenco de la kvindekaj jaroj ŝi venis de Tianjin al iu postfronta hospitalo en Nordoriento. Ŝi senlace laboris por kuraci vunditajn soldatojn. Sed ŝi ĉagrenis de tio, ke ŝi ne havis la kapablon fari taŭgan nazon por unu vundita soldato. Sub direktado de iu ostologia fakulo, ŝi faris por li nazon per lia frunta haŭto. La operaciito ricevis nazon, sed tio postlasis al li grandan cikatron sur la frunto, kaj cetere la nazo estis tre malbela. Ŝi neniel povis trankviliĝi, kaj ekde tiam ŝi decidis dediĉi sian tutan energion al fondo de makzeloformiga ĥirurgio de sia Patrio.



Prof. Dong Shufen

En 1954 Dong Shufen veturis al Sovetunio por studi. En la periodo de studo ŝi tralegis preskaŭ ĉiujn ruslingvajn fakajn materialojn pri makzeloformiga ĥirurgio. Ŝi tre akcentis praktikon kaj partoprenis en pli ol 200 operacioj en tri jaroj. En feriaj tagoj, kiam la kunlernantoj vojaĝis en pitoreskejoj, ŝi aŭ legis en biblioteko, aŭ faris operacion en hospitalo.

En 1957, Dong Shufen revenis al la Patrio kun la titolo de vicedoktoro. Ŝi estis sendita al la Xi-an-a Medicina Instituto. Tie ŝi faris la unuan sukcesan

operacion de faro de nazo al unu junulino. Dank' al ŝia klopodo feliĉe edziniĝis tiu ĉi junulino.

Nelonge post tio, venis al la hospitalo laboristo Li Xiuyuan de la Shenyang-a Cementa Fabriko, kiu distancas de Xi-an pli ol 1,000 kilometrojn. En iu batalo de 1947 Li Xiuyuan estis vundita de bombo kaj perdis la nazon kaj kelkajn dentojn de la maksilo. Vidinte tiun ĉi laboriston, ŝi tuj rememoris la malbelan nazon de la soldato. Ŝi faris al li nazon per Filatova operacio.

Tiam la kutima metodo estis fari nazon per frunta haŭto. Sed Dong Shufen ne volis lasi al la paciento novan cikatron sur la frunto. Pere de sia riĉa klinika sperto, ŝi maksimume maldikigis la subhaŭtan grason de la Filatova haŭtotubo, restigis la subhaŭtan angian reton. Tiu operacio estis plene sukcesa.

En la fotoalbumo ni vidis foton kun multaj homoj. Ŝi lasis nin montri, kies nazo estis artefarita. Sed post longa komparado ni ne povis distingi, kiu el la fotitoj portas artefaritan nazon.

Kvankam ŝi havas aĝon de pli ol 60 jaroj kaj ĝuas altan renomon en la socio, tamen ŝi ankoraŭ aktive partoprenas en operacioj. Ĉiusemajne ŝi faras operacion kvinfoje, kaj ŝi ĉiam persone ŝanĝas por siaj operaciitoj plastron por trovi leĝon de la vundo-kuniĝo. Ŝi ofte esploras la strukturon de la vizaĝa haŭto kaj la diferencojn de la organsituoj de diversformaj vizaĝoj, por fari la vizaĝon de operaciitoj pli agrabla. Ŝi mendis filmgazon por esplori la vizaĝon de filmaktoroj kaj laŭeble beligi la vizaĝon de operaciitoj.

En malsanula ĉambro, la kelkmonata bebo Wang Xin tre ŝatis esti ĉirkaŭbrakumata de profesorino Dong. Ankaŭ la juna patrino de la bebo tre ĝojis vidi ŝin. Sed antaŭ tio la patrino multe suferis pro la denaskaj leporlipoj de la bebo. Vidinte tian bebon, la akuŝinto ploris ĉagrene. Ŝi kaj ŝia edzo vizitis multajn hospitalojn, sed neniu promesis ripari la denaskan mankon. Fine ili venis al la Dua Dependata Hospitalo de la Xi-an-a Medicina Instituto. Spertoriĉa profesorino Dong fa-

ris al la bebo unufojan operacion de samtempa riparo al leporlipoj kaj nazo. Ŝi tute ŝanĝis la vizaĝon de la bebo.

Profesorino Dong ne havas infanon. Ŝi verŝis sian tutan koron sur la malsanulojn. Ŝi amas ĉiun operaciaton, ĉu kelkmonatan infanon, ĉu 60-70-jaran maljunulon. Ĉe pacientoj ŝi ĉiam tenas sin gaja kaj bonhumora. Ŝi diris al ni: "Oni opinias miajn pacientojn malbelaj, sed mi trovas, ke ili ĉiuj estas amindaj."

En la pasintaj 30 jaroj ŝiaj pacientoj estas nenombreblaj. Oni ne povas kalkuli, al kiom da homoj ŝi redonis esperon kaj amon.

Ni havis longan interparoladon kun operaciito Lei Yuan kaj lia edzino Zhang Bingchen. Ili rakontis al ni pri la kortuŝa fervoreco de profesorino Dong Shufen.

Nokte de la 26-a de marto, 1978, teknikisto Lei Yuan de la Cementa Fabriko de Tongchuan venis en sian laborejon. Subite eksplodis la cementbakujo kaj Lei estis envolvita de elŝprucinta cemento kun temperaturo de mil kaj kelkcent gradoj. Liaj vizaĝo, kolo kaj manoj estis serioze vunditaj. Post kuraco li estis savita, sed tute ŝanĝigis lia vizaĝo: malaperis la kolo, kunligigis la mentono kun la brusto, la palpebroj kaj lipoj turnigis eksteren, la fingroj dikiĝis kaj kurbiĝis interligite de membranoj, la oreloj gluiĝis al la vangoj. La timiga vizaĝo, la perdo de kapablo de prizorgo en ĉiutaga vivo tute malesperigis Zhang Bingchen, edziniĝintan antaŭ duonjaro.

En la hospitalo, kun granda ĉagreno ŝi prizorgis la edzon;

sed ŝi ofte larmis en angulo de kie ŝi povis ne esti vidata de sia edzo. Profesorino Dong bone scias, ke nur ŝia klopodo povas redoni al li la feliĉon. Ŝi kaj ŝiaj helpantoj faris al li 13 operaciojn por grefti al li grandarean haŭton kaj tiel Lei Yuan povis levi la kapon. Ŝanĝigis lia vizaĝo kaj la dekstra mano reakiris funkcion.

Profesorino Dong, kiel bonkora patrino interparolis kun Zhang Bingchen, admonis ŝin ĝuste trakti la homan vivon kaj komprenigis ŝin, ke la plej aminda estas ne la vizaĝo, sed la animo. Ŝia sincereco refoje bruligis al ŝi la flamon de amo en la koro.

La junaj geedzoj ĝoje revenis hejmen. Post kelkaj monatoj, en novembro de 1980, ili refoje venis al la hospitalo por kuraci la maldekstran manon.

Iun tagon de decembro, ni venis al la hospitalo por viziti Lei kaj Zhang. Ni vidis, ke Lei Yuan jam povas bone skribi per fontoplumo. Li mendis la gazeton «Cemento» kaj ĉiutage legis ĝin. La junaj geedzoj estis profunde kortuŝitaj de profesorino Dong kaj diris al ni en emocio: "Profesorino Dong ne havas infanon, ni ja estas ŝiaj infanoj. Kiam ni havos infanon, ĝi estos ŝia nepo."

Ĉiuj havas en sia vivo plej feliĉajn momentojn. Kaj tiaj momentoj por profesorino Dong estas la tempo, kiam la pacientoj estis kuracitaj kaj forlasis la hospitalon. Kiam la bebo Wang Xin estis forlasanta la hospitalon, la profesorino alprenis ĝin kaj ĝoje kisadis ĝin refoje. Ŝiaj okuloj estis plenaj de larmoj— ŝi sentis sin la plej feliĉa en la mondo.



Fremdlandaj esperantistoj kaj la ĉina Esperanto-movado

de HOU ZHIPING

ESPERANTO estis enkondu-
kita en Ĉinion ĉirkaŭ la kom-
menco de la kuranta jarcento.
Laŭdire, la urbo Harbin en la
Nordoriento plej frue havis rilat-
ton kun Esperanto en Ĉinio.
Tie estis multaj rusaj esperantis-
toj-komercistoj, kiuj komercis
inter Vladivostok (Haishenwai)
kaj Harbin kaj instruis Esperan-
ton en la lasta urbo. Tiam en
Harbin negocis ankaŭ Shanghai
(Ŝanhaj)-aj komercistoj. Ili
lernis tie Esperanton kaj poste
ĝin disvastigis en Shanghai.
Ĉirkaŭ 1909 esperantistoj Hua
Nangui, ĉina studento lernanta
en Francio, kaj lia pola edzino
S. Horose fondis en Parizo
“Sciencan Revuon” kaj eldonis
ĝin en la ĉina lingvo kaj Espe-
ranto. La revuo plenenergie
propagandis Esperanton kaj dis-
tribuiĝis al Ĉinio kaj fariĝis unu
el la revuoj plej frue konigantaj
Esperanton en Ĉinio. Dume Liu
Shipei, Zhang Ji kaj aliaj lernis
Esperanton de s-ro Oosugi
Sakae en Japanio. Reveninte al
la patrolando, ili funkciigis Es-
peranto-kurson en Shanghai. El
tio ni povas konkludi, ke la en-
konduko de Esperanto en Ĉi-

nion rilategis kun esperantistoj
de Rusio, Pollando, Japanio k.a.

Esperanto prosperis en Ĉinio
en sia komenca periodo. Sed
poste la Esperanto-movado iom
post iom depresiĝis pro nestabi-
leco de la politika situacio en la
lando kaj eksplodo de la Unua
Mondmilito. Ĝi reanimiĝis kun
prosperiĝo de la Nova Kultura
Movado de “La Kvara de Majo”
en 1919. Tiam rusa junulo
nomata Stopani venis al Shang-
hai kaj aktive sin okupis pri ins-
truado de Esperanto. Li kun-
vokis la tieajn samideanojn,
organizis la Ŝanhajan Esperan-
to-Asocion kaj fondis Esperan-
to-kurson. Kvankam li renkon-
tis multajn malfacilojn en tio,
tamen li neniom ŝanceliĝis kaj
daŭrigis la instruadon 2 jarojn.
Por prosperigi la Esperantajn
laborojn li eĉ oferis grandan
parton de sia salajro al la Espe-
ranta afero. Lia granda entu-
ziasmo por Esperanto multe
kortuŝis ĉinajn samideanojn.
Estis bedaŭrinde, ke li mortigis
sin mem pro pesimismo en sia
aĝo de nur 21 jaroj. En sia
testamento al la Ŝanhaja Espe-
ranta Asocio li esperis, ke la
ĉinaj samideanoj daŭrigos la de

li neplenumitan laboron. Ĉiuj
tre bedaŭris pro lia morto kaj
entombigis lin en la Universala
Tombejo de Shanghai.

En aŭtuno de 1921 fama rusa
blinda poeto V. Eroŝenko venis
al Shanghai kaj faris multajn
laborojn por la Ŝanhaja Espe-
ranto-Asocio. Informiĝinte ke
la asocio havas grandan malfac-
ilon en financo, li iniciatis
Internacian Muzikan Vesperon,
en kiu ludis la muzikistoj de
Rusio, Japanio, Koreio kaj
Ĉinio. Eroŝenko deklamis en ĝi
sian poemon verkitan en Espe-
ranto kaj kantis Esperantajn
kantojn. Li uzis la enspezon
ricevitan de vendo de la biletoj
por pagi lukoston de la ludejo
kaj kovri ŝuldojn de la Ŝanhaja
Esperanto-Asocio. Kaj krome li
ankaŭ aĉetis eksterlande nom-
bron da Esperantaj libroj kaj
gazetoj, per kiuj li fondis mal-
grandan bibliotekon. Poste laŭ
la invito de s-ro Cai Yuanpei li
iris al la Beijing-a Universitato
por doni lekcion de Esperanto,
kies aŭskultantoj jam atingis
500-600. Krom instrui Esperan-
ton li ofte prelegis pri Esperanto
kaj Esperantaj literaturaĵoj en
kaj ekster la universitato kaj

verkis Esperantajn literaturaĵojn. Plejparte de liaj prelegoj kaj verkoj estis ĉinigitaj kaj publikigitaj en tiamaĵ ĵurnaloj kaj gazetoj kaj estis ŝatata de la ĉinaj legantoj. Je la 15-a de decembro de 1922 Eroŝenko ĉeestis Esperantan Unuiĝan Kunvenon de la Beijing-a Universitato kun partopreno de pli ol 2,000 personoj. En ĝi li faris entuziasman paroladon kaj ankaŭ kantis Esperantajn kantojn, kiuj per sia oreplaa melodio emociis la ĉeestantojn. En tiu periodo li ofte donis utilajn konsilojn al la Pekina Esperanto-Asocio. En 1922 kiel reprezentanto de la Pekina Esperanto-Asocio li ĉeestis la 14-an Universalan Kongreson en Helsinko. Reveninte de la kongreso li raportis al la asocio pri la kongreso kaj estis elektita kiel sekretario de la asocio. Poste li instruis Esperanton ĉiusemajne 9 horojn en la Esperanta kurso funkciigita de la Pekina Esperanto-Asocio. Estis bedaŭrinde, ke li sentis eksterordinaran solecon en la tiama Ĉinio kaj tre sopiris al sia patrolando — Rusio-patrino kaj najtingaloj de sia hejmoloko, kaj li foriris al la patrolando en la fino de printempo en 1923.

Kvankam Eroŝenko adiaŭis Ĉinion, tamen ekĝermis la de li semita verda semo. En aŭtuno de la sama jaro, kiam li foriris al Rusio, fondiĝis Pekina Esperanta Kolegio, en kiu instruis lia amata lernanto Feng Xingsan. En ĝi instruis ankaŭ du rusaj instruistoj Sofoklof kaj I. Seriŝev kaj usona instruistino M. Root, kiuj kontribuis por disvastigo de Esperanto kaj amikeco. Bedaŭrinde post du jaroj la kolegio ĉesis funkcii pro diversaj kialoj.

En la periodo de la 20-aj ĝis la 30-aj jaroj de la kuranta jar-

cento aliaj fremdlandaj esperantistoj faris grandajn kontribuojn al la ĉina Esperanto-movado. Ekzemple japana esperantisto Kokamura Kumeiĉi instruis Esperanton en Hankou de Hubei, kie studis Esperanton fama ĉina esperantisto Tikos. En printempo de 1930 li estis elektita kiel membro de la Plenuma Komitato de la Hankou-a Esperanto-Asocio. Alia japana amiko Taiji Yamaga instruis Esperanton en la Jiangwan-a Labora Universitato de Shanghai en 1927.


Krome, dum sia laborado en Shanghai aŭstra esperantisto F. Ebner donis fervoran helpon al la Shanghai-a Esperanto-movado. En 1933 venis al Ĉinio Hungara esperantisto Fedorĉak, kiu vizitis la urbojn Shanghai, Beijing, Guangzhou (Kantono), Suzhou, Nanjing k.a. kaj antaŭenpuŝis la Esperanto-movadon de tiuj lokoj. Dum la kvar monatoj de sia restado en Shanghai li laboris kiel instruisto de Esperanta kurso laŭ la invito de la Ŝanhaja Esperantista Ligo kaj helpis ĝin en ĝiaj laboroj. Fedorĉak tre bele kaj flue parolis Esperanton. Li tre rigore postulis de la kursanoj kaj eĉ nun li ankoraŭ vivas en la memoro de multaj ĉinaj maljunaj esperantistoj.

En tiu tempo venis al Ĉinio vojaĝi kaj viziti aliaj fremdlandaj esperantistoj, inter kiuj estis franca vojaĝisto Cucien Peraire. Li vojaĝis 30,000 kilometrojn per biciklo por propagandi Esperanton. Post kiam li atingis Wuhan en vintro de 1930, li faris tie plurajn prelegojn laŭinvite. Inter tiuj fervoraj pioniroj estis ankaŭ fama japana pentristo Oohaŝi Kaiziro, germana poeto Zeihile kaj usonano, s-ro J. R. Scherer, delegito sendita de la

Internacia Centra Komitato de Esperanto-movado al Azio por inspekto. Kien ajn ili venis, ili tie renkontiĝis kun lokaj esperantistoj kaj faris raportojn kaj prelegojn. Tiuj agadoj ne nur havigis al la lokaj esperantistoj ŝancojn por sin ekzerci en parolado, sed ankaŭ plifortigis amikecon inter ili kaj interŝanĝis sperton pri E-movado.

Al la ĉina Esperanto-movado kontribuis ankaŭ koreaj samideanoj. Frue en la komenco de la dudekaj jaroj funkciigis Esperantan kurson en la Chengdu-a Alta Normala Lernejo korea esperantisto Gao Zixing, de kiu lernis Esperanton ĉina fama verkisto Bakin. Alia korea kamarado nomata T. C. Kim, kiun ĉinaj samideanoj ameme nomis Grasa Zhang, instruis Esperanton en la Beiping-a Normala Universitato en la komenco de la 30-aj jaroj. Li ofte elektis artikolojn el verkoj de Lenin, Stalin kaj el la revuo "Sur Posteno" kiel lernomaterialojn. Li lernigis al la kursanoj Esperantaj kantojn "La Internacio", "Tiru Forte", "Tagiĝo" k. a. Samtempe li kuraĝigis la kursanojn korespondi kun alilandaj esperantistoj. Li helpis ilin per korektado de iliaj leteroj. Li ofte pagis sendokostojn de letero por iuj kursanoj, kiuj estis malfacilaj en la vivo. Poste, li kun aliaj samideanoj iniciatis "Federacion Esperantistan de Pejpingo" kaj helpis en kompilado kaj distribuado de ĝia organo "Bulteno". Antaŭ forlaso de Beiping li donacis al ĉinaj kamaradoj ĉiujn Esperantajn librojn kaj gazetojn konservitajn de li dum multaj jaroj.

En la ĉina naciŝava movado kaj la Kontraŭjapana Rezistmi-



*Lusin (la centra)
kaj Eroŝenko (la
maldekstra) en
Beijing, 1922*

lito ĉinaj esperantistoj prenis Esperanton kiel efikan internacian propagandilon, eldonis en Esperanto “Ĉinio Hurlas”, “Voĉoj el Oriento”, “Heroldo de Ĉinio” kaj aliajn revuojn, kiuj raportis al la mondo kruelaĵojn de la japanaj agresantoj kaj priantis la heroan batalon de la ĉina popolo. La justa afero de la ĉina popolo ricevis simpatian kaj subtenon de diverslandaj esperantistoj. Ili tradukis kaj publikigis artikolojn de la ĉinaj revuoj, okazigis ekspozicion pri la batalo de la ĉina popolo kontraŭ la japana agreso kaj diversajn mitingojn por montri sian subtenon al la ĉina popolo en ĝia justa batalo. Tiam ankaŭ progresemaĵoj fremdlandaj esperantistoj en Ĉinio sin ĵetis en la batalon kontraŭ la japanaj faŝistoj. Hungara esperantisto Braun funkciigis en Hongkong “Orientan Kurieron” por batali kontraŭ la agreso de la japanaj imperiistoj kaj subteni la ĉinan popolon.

Li kune kun Venlo Fen kaj Tikos esperantigis kaj eldonis “Elektitajn Novelojn de Lusin”. La laboron partoprenis ankaŭ la korea esperantisto Elpin, kaj fina formo de la tuta tradukaĵo estis farita de Braun.

Estas neforgesebla por ni la fama internacia batalantino japana verkistino Verda Majo. Ŝi venis al Shanghai en 1937 kaj helpis la Ŝanhajan Esperantistan Ligon en la laboro kaj redaktado de “Ĉinio Hurlas”. Post kiam Shanghai falis, ŝi venis al Wuhan kaj laboris tie kiel parolistino de la japana lingvo. Ŝi verkis artikolojn en Esperanto por malkaŝi kruelaĵojn de la japanaj agresantoj kaj alvokis la tutmondajn esperantistojn helpi la ĉinan popolon en ĝia kontraŭjapana milito. Poste ŝi venis al Chongqing kaj daŭrigis sian laboron sub la Kontraŭmalamikula Kultur-labora Komitato gvidata de Guo Moruo. Ŝi verkis en Esperanto “Flustr’

el Uragano”, “En Ĉinio Batalanta” k.a. kaj esperantigis romanon de la fama japana verkisto Iŝikaŭa Tacuzo “Vivantaj Soldatoj”. Tiuj verkoj estis publikigitaj en “Heroldo de Ĉinio” kaj eldonitaj de la Koresponda Esperanto-Lernejo de Chongqing en broŝuroj. Ŝi ne nur zorgis la revuon “Heroldo de Ĉinio” kaj la Korespondan Esperanto-Lernejon de Chongqing, sed ankaŭ helpis junajn esperantistojn de la redakcio de “Heroldo de Ĉinio” kaj kursanojn en ilia lernado de Esperanto kaj korektis iliajn esperantajn tradukaĵojn.

El la supre dirita ni povas vidi, ke multaj fremdlandaj esperantistoj elverŝis multan ŝviton kaj faris valoran kontribuon por propagandi Esperanton en Ĉinio. Profunda amikeco formiĝis inter ili kaj ĉinaj samideanoj en la komuna laboro kaj batalo kaj ili estis por ni amikoj kaj kamaradoj neniam forgeseblaj.



Prof. Lu Jianbo

El la veteranaj esperantistoj konitaj de mi, mi tre admiras Lu Jianbo, profesoro de la historia fakultato de Sichuan-universitato. Li silente klopodis preskaŭ 60 jarojn por disvastigi Esperanton en Ĉinio.

UNU EL LA PLEJ FRUAJ ESPERANTISTOJ DE ĈINIO

Lu Jianbo naskiĝis en Hejiang-gubernio de Sichuan (Siĉuan)-provinco, en 1904. Ekde sia knabaĝo, li estis edukita de sia rigora patro. Li legis multajn verkojn en la klasika ĉina lingvo. Sed lia scivolema koro neniel kroĉiĝis al tiuj malnovaĵoj. Kelkajn jarojn antaŭ 1920, li sukcesis akiri tiajn klerigajn revuojn, kiaj “Nova Junulo”, “Nova Tajdo” k.a. Dum legado, li konatiĝis kun Esperanto, kiu tiklis lian koron al lernado. Sed li ne havis lernolibron. En 1920, kiam li studis en la dua klaso de gimnazio, li trovis lernolibron de Esperanto fine kaj memlernis, eĉ ne sciante kiel precize elparoli la literon.

VEJDO:

Pri Profesoro Lu Jianbo

En la sama jaro okazis studenta striko, kiun li partoprenis. Por eviti persekutadon de la reakcia loka instanco, li fuĝis al la urbo Chongqing (Ĉongking). Ekde tiam li komencis sian novan, memstaran sed mizerplenan vivon: En la urbo li konatiĝis kun multaj progresemluloj kaj ankaŭ kun sia unua instruanto de Esperanto — Xiao Juhua, kuracisto el Hubei-provinco. De tiu lasta li akiris esperantaĵojn kaj Esperantan-Ĉinan Vortaron por sia plua studado. Nelonge post tio, li fondis la revuon “Hejiang-tajdo” kaj publikigis en ĝi multajn artikolojn pri Esperanto. En 1922, kiam li daŭrigis sian studadon en Nanjing (Nankino), li amikiĝis kun Bakin, kiu jam esperantistiĝis kelkajn jarojn pli frue, kaj Lü Shuxiang, tiama duonbakita esperantisto kaj nuna elstara filologo de nia lando. Fininte sian studadon en gimnazio, li veturis al Beijing (Pekino) por enira ekzameno de la Beijing-universitato. Tiam li familiariĝis kun Feng Xingsan, studento de la Beijing-universitato, kiu lernis Esperanton sub la gvido

de la rusa blinda poeto Eroŝenko. Feng donacis al li “Poemaro de Heine” en Esperanta vesto, kiun li ĉinigis kaj publikigis broŝure.

Dum 1925-1931, li loĝis en Shanghai (Ŝanhajo). Por vivteni sin mem, li skribis kaj tradukis por lokaj revuoj kaj ĵurnaloj. Post nelonge li kontaktiĝis kun la Ŝanhaja Esperanto-Asocio kaj fariĝis ties membro. Tiam li ekkonis japanan samideanon Tajĝi Jamaga, kiu instruis Esperanton siatempe en la Ŝanhaja Labora Universitato. En tiu tempo k-do Lu pli aktivis en E-movado kaj ĉinigis el Esperanto novelojn de Hungario kaj Sovetunio “Kemio de Universo” de SAT kaj pecojn el la revuo “Voks” de Sovetunio. Tiuj aktivadoj multe altigis lian nivelon de Esperanto.

ELSTARA ESPERANTISTO EN SIA HEJMLOKO

En 1931, reveninte al Sichuan-provinco, Lu aktive partoprenis en la loka E-movado. Kiel instruisto de iu mezlernejo en San-

tai-gubernio, Lu oficiale instruis Esperanton. En 1933, li fondis kune kun aliaj samideanoj la Chengdu-an Esperanto-Asocion, kies organo "Verda Standardo" eldoniĝadis monate. Inter liaj kontribuaĵoj al tiu organo, menciinda estas lia traduko de "La Elementoj kaj la Vortfardo, Gramatiko kaj Sintakso en Esperanto" verkita de E. Ĉefeĉ. Krom tio, li ankaŭ publikigis sian tradukon de "Teorio de Esperanto" de V. Varankin.

En la 30-aj jaroj li kune kun fervoraj esperantistoj Che Yaoxian kaj Zhang Liangqing redaktis la revuon "Lingvo" por propagandi la projekton de latinigo de Han-lingvo kaj Esperanton.


La fondiĝo de la popola respubliko prilumis nian Esperantuĵon. Prof. Lu faris ankaŭ kontribuojn al E-movado. En 1963, li sukcesis starigi Esperantan kurson en Sichuan-universitato. Li mem kompilis lernolibron kaj donis instruadon.

En 1979 fondiĝis la Chengdu-a Esperanto-Asocio, kies vicprezidanto estas prof. Lu. Kvankam grandaĝa, li kiel antaŭe tre zorgis pri la Esperanta laboro. Li ofte venis al Esperanto-kurso por helpi ĝian instruiston kaj kuraĝigi ĝiajn lernantojn.

FAKULO PRI HISTORIO KAJ LINGVOJ

Prof. Lu estas specialisto pri la antikva historio de Grekio kaj Romana Imperio. Li bone scias la latinan lingvon kaj la

Foto de la aŭtoro kun prof. Lu (la maldekstra)



klasikan grekan lingvon, kaj tre interesiĝas pri la kulturo, filozofio, religio kaj socia vivo de la antikvaj Grekio kaj Romana Imperio. Li ĉinigis multajn verkojn de antikvaj grekaj tragediistoj kaj aliajn artikolojn pri la antikvaj Grekio kaj Romanio. Krome, li ankaŭ verkis disertaĵojn pri la grekaj filozofio kaj literaturo.

Prof. Lu lernis ankaŭ la lingvojn anglan, francan, germanan, rusan, italan kaj hispanan. Li ĉinigis multajn verkojn el diversaj originaloj. Li ankaŭ havas grandan intereson por Esperanta poezio kaj, ekde fruaj jaroj, li enkondukis ĉinlingven la poemojn de Baghy kaj Kalocsay. Ĉirilate, li prezentis al la ĉina publiko la poemaron "Mondo

kaj Koro" kaj multajn erojn el "Eterna Bukedo" de Kalocsay.

Kiam mi vizitis lin, li ofte diris al mi sian opinion pri diversaj lingvoj. Li diris, ke kvankam li lernis preskaŭ dek lingvojn, li tamen favoras Esperanton. Laŭ lia opinio, kiel artefarita lingvo, Esperanto alproprigis vivipovajn elementojn el la naturaj lingvoj. La historio de pli ol 90 jaroj pruvis, ke Esperanto estas multe supera al tiaj planlingvoj, kiaj Occidental, Interlingua, Universal, Romanal, Novial, Volapuk, Ido k.a. Ni konsentas la opinion, ke la literaturo de Esperanto ankoraŭ ne atingas sian perfektan etapon. Sed kiu povus aserti, ke ne aperos tiel granda verkisto en Esperanta literaturo kiel Shakespeare?

Eternan Pacon al Nia Kunlaborantino



S-ino Janet de Skotte, fervora esperantistino de Peruo kaj peranto de El Popola Ĉinio en tiu lando, forpasis la 20-an de novembro 1980 en Lima. Ŝi organizis multajn Esp. kursojn kaj estis fakte fondinto kaj ĉefa animanto de la Perua Esperanto-Asocio. Multan laboron ŝi faris por la varbado de peruaj abonantoj al nia revuo pruvante sin sincera amiko de nia redakcio. Ni esprimas nian profundan kondolencon pro la forpaso de s-ino Janet de Skotte.

Espereble ŝia kolegaro en Peruo daŭrigos ŝian laboron kun sama fervoro.

Forpasis F-ino Marie Bonafous

F-ino Marie Bonafous, franca esperantistino kaj nia malnova amikino kaj legantino, forpasis je la 28-a de decembro 1980, en la aĝo de 79 jaroj.

Estante admiranto de Ĉinio kaj la ĉina popolo, ŝi venis al Beijing (Pekino) en 1964 kaj laboris kiel fakulino de la franca lingvo en la redakcioj de la revuoj "Ĉina Literatura" kaj "Ĉinio en Konstruado" du jarojn. Dum tiu periodo ŝi estis en konstanta amika kontakto kun nia redakcio kaj kun multaj ĉinaj esperantistoj.

Dum sia vivo ŝi verkis franclingvajn poemojn, inter ili estas: "Impetega Riverego", "De Abismo al Lumo", "La Vimena Korbo" kaj "La Reĝa Aglo". La lasta poemaro estis eĉ kronpremiita de la Franca Akademio.

F-ino Marie Bonafous kun sia profunda kaj vasta klareco, sia serioza sindediĉemo al laboro kaj sia ver-ama karaktero ĉiam restos en nia memoro.

(Daŭrigo de p. 45)

fonton de energio, tamen ĝi konsumas grandegan kvanton da energio. Tial Usono metas en la unuan lokon konstruon de nukleelektraj stacioj en la plano de disvolvo de elektra industrio, kaj prenas nuklean energion kaj karbon kiel du apogilojn de la estonta energio. Ankaŭ Sovetunio sufiĉe riĉa je energiaj riĉfontoj decidis en 1979 dekoble pliigi la kapaciton de nukleaj


generatoroj en la venontaj dek jaroj. Nun la elektro produktita de nukleaj elektrejoj de Usono, Britio, Francio, FR Germanio, Svislando, Japanio, Bulgario kaj Finnlando superis 10% de la totala kvanto de elektro, kaj tiu de Svedio kaj Belgio superis 20%.

Estas atentinde, ke nemalmultaj landoj de la tria mondo aktive disvolvas la nuklean energion. Hindio, Pakistano kaj

Argentino havas funkciantan nukleelektran stacion. Rumanio, Egiptio, Bangladeŝo, Brazilo kaj Meksikio konstruas aŭ mendis nukleelektran stacion. Oni raportis, ke en la fino de la kurranta jarcento funkcios eble 20-30 reaktoroj en la Latin-Ameriko, kaj 30-40 reaktoroj estos konstruataj. Tio montris, ke disvolvo de nuklea elektrejo estas grava politiko alprenita de multaj landoj post analizo de la perspektivo de la energio.


La unua ĉina granda alt-fluksa atoma reaktoro konstruita

La reaktoro projektita de Ĉinio mem estis fin-konstruita lastatempe en sudokcidenta Ĉinio kaj komencis alt-povan funkciadon. Ĝi havas termopovon de 125,000 kilovattoj kaj ĉiusekundan maksimuman flukson de 620,000 miliardoj da termoneŭtronoj po kvadrata centimetro. Tian grandan reaktoron konstruis nur malmultaj disvolviĝintaj landoj. La ĉefa kaj kompletigaj konstruaĵoj de tiu reaktoro havas pli ol 50,000 ekipaĵojn, kiuj ĉiuj estas fabrikitaj de Ĉinio mem. La sukcesa konstruo montris, ke Ĉinio povas projekti kaj konstrui nukle-egan stacion per sia propra forto, kaj ke la tekniko de Ĉinio por konstrui atoman reaktoron atingis novan nivelon.



Konstruaĵoj de la unua ĉina granda alt-fluksa atoma reaktoro


Dejorantoj kontrolas radioaktivan dozon de la sistemoj de la reaktoro kaj laborejoj per mezuriloj por sekurigi la produktadon.




Tera Arbaro

En Banguo-regiono de Yuanmou-gubernio de Yunnan-provinco de Ĉinio estas tera arbaro. Rigardate de malproksime iuj teraj arboj similas al kasteloj, aliaj al palacoj, kaj triaj al homfiguroj.

La tera arbaro sin trovas ambaŭflanke de la sekigita Baisha-rivero. Ĝi formiĝis el sablo, tero kaj gruzo entenantaj feron kaj kalcion, post erozio de milionoj da jaroj.





“Ĉielskrapanta Kolono”



Parto de la tera arbaro

Tera arbaro



“Antikvaj Militistoj”



NOVAĴOJ PRI 66-A UK

* Nefermita inaŭguro: La Solena Inaŭguro de la 66-a Universala Kongreso verŝajne okazos ekster la kongresdomo, en ejo sufiĉe granda por akcepti ne nur la kongresanojn, sed ankaŭ multajn interesitojn el la ĝenerala publiko en Brazilio. Intencas ĉeesti, kaj tre verŝajne persone paroli, la Alta Protektanto de la Kongreso, la prezidanto de Brazilo, João Baptista de Oliveira Figueiredo. Estas antaŭvidite, ke la inaŭguran paroladon faros la prezidanto de la Akademio de Esperanto, William Auld.

* Kulturoj kaj lingvoj: pontoj kaj baroj. Tiun temon traktos la Kongreso el tri vidpunktoj, laŭ la disdivido farita de Baldur Ragnarsson en la ĉefartikolo de Esperanto, februaro 1981: sociologia, nacikultura kaj ĝenerala. Prelegos Ragnarsson mem, Humphrey Tonkin kaj Sylla Chaves, kaj la kongresanoj havos okazon partopreni la diskutadon.

* Ĉen Juan, vicprezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo, kiel lingvisto faros prelegon "Interfluo de lingvoj" en la 34-a sesio de Internacia Kongresa Universitato. La prelegsesio entute prezentos 13 prelegantojn el 11 landoj. Rektoro de la ĉi-jara sesio estas Paulo Vieira de Silva, konata specialisto pri edukado en la Universitato de Brazilio.

LA ĜENERALA DIREKTORO DE UNESKO AKCEPTIS DELEGACION DE UEA

En la sidejo de Unesko en Parizo, la Ĝenerala Direktoro de tiu monda organizaĵo — s-ro Amadou-Mahtar M'Bow — la 17-an de marto ĉi-jare akceptis en aparta aŭdienco kvarpersonan delegacion de Universala Esperanto-Asocio. En 45-minuta



La Ĝenerala Direktoro de Unesko akceptas delegacion de UEA.

interparolo leviĝis pluraj temoj rilate la kunlaboron inter la du organizaĵoj. La Ĝenerala Direktoro estis tre forte impresita de la kolekto de ĉiuj 15 libroj el la Serio Oriento-Okcidento, kiujn la delegacio transdonis al li. S-ro M'Bow promesis sendi specialan reprezentanton de Unesko al la ĉi-jara Universala Kongreso en Brazilio. Krome, informiginte pri la preparoj por la centjara jubileo de Esperanto en 1987, la Ĝenerala Direktoro de Unesko instigis UEA organizi tiuteman solenajon en la sidejo de Unesko kaj promesis, ke li mem partoprenos ĝin. Ĉi tiu renkontiĝo denove pruvis, ke la Internacia Lingvo havas gravan amikon en la personeco de la Ĝenerala Direktoro de Unesko.

ESPERANTO — PONTO INTER ORIENTO KAJ OKCIDENTO

Lige kun la 25-jara datreveno de lanĉita fare de Unesko la granda projekto "Oriento-Okcidento" oni organizas en unu el vrocлавaj muzeoj grandskalan publikan ekspozici-

cion s. t. "Esperanto — Ponto inter Oriento kaj Okcidento". Por la ekspozicio oni serĉas ĉiuspecajn esperantaĵojn eldonitajn en Azio. Rekompenco per polaj esperantaĵoj. Adreso: Esperanto-Biblioteko de la Familio Wojtakowski, P. O. Kesto 312, PL 50-950 Wroclaw 2, Polando.

NACILINGVA BROŜURO PRI ESPERANTO KAJ LA LABORISTA MOVADO

La revuo "Voĉo" (Borovo, Jugoslavio) fotorepresis felietonon de M. Ĝivoje kaj d-ro Ivo Borovečki, kiu en 15 daŭrigoj aperis en kroatlingva taggazeto "Novi List" (Rijeka) en 77,000 ekz. La broŝuro havas 44 p. Ĝi entenas trarigardon pri Esperanto kaj la laborista movado en mondaj kaj landaj kadroj, kaj estas unuaranga informilo por esperantista kaj neesperantista publiko.



ISAE — NOVA ESTRARO

Ekde la 20.01.1981 la Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE) havas novan estraron elektitan por la periodo 1981-1985. Jen ĝia konsisto: Prezidanto Prof. Carl Stop-Bowitz (Norvegio)

Vicprezidanto Prof. Sinitirô Kawamura (Japanio)

Prof. inĝ. Vasil Peevski (Bulgario)

Ĝenerala sekretario Inĝ. Christian Darbellay (FR Germanio)

Sekretario-kasisto Prof. Paul Edwin Kustaanheimo (Danlando)

ISAE estas la plej malnova faka asocio, fondita en 1906, kun ĉirkaŭ 600 membroj. Ĝi ligas la sciencistojn kaj la sciencinteresitulojn. Kvarfoje jare ĝi aperigas Sciencan Revuon, la plej altnivelan scienc-teknikan revuon en la movado.

INTERNACIA LITERATURA KONKURSO DE MADRIDA ESPERANTO LICEO

La 111-a Internacia Literatura Konkursito de Madrida Esp-Liceo estas organizita. Estos kvar branĉoj, unu premio po branĉo: Prozo (originala, minimume 2,000 vortoj), poezio (originala), eseo (originala) kaj traduko (el hispana proza verkaĵo, minimume 2,000 vortoj). Limdato: 1 okt. 1981. Oficiala disdonado de premioj okazos 6 dec. 1981. Oni sendu originalon kaj 4 kopiojn al Madrida Esperanto Liceo (por la Literatura Konkursito), c/ Atocha 98, 40, Madrido-12, Hispanio.

MESAĜO EL KANADO

En la komenco de marto de la kuranta jaro Prezidanto de Kanada Esperanto-Asocio Wallace G. du Temple sendis al ni mesaĝon, skribitan de la nomita asocio al alilandaj esperantistoj okaze de la Semajno de Internacia Amikeco. Retrorigardinte la komencan periodon de Esperanto, la mesaĝo diras:



Inaŭgura kunveno de la Esperanta Centra Studrondo de Shashi

“Al niaj pioniroj kiuj lernis la lingvon de D-ro Ludoviko Zamenhof, perfektigis kaj poste uzis ĝin, al ili, kies herkulaj laboroj diskonigis informon pri nia lingvo eĉ spite de moko kaj fakaj profesiaj, eĉ post grandaj financaj perdoj, al ili, kiuj tenis la verdan standardon alte dum la malhelaj tagoj de la komenco, al ili ni elkore salutas. Nia komuna ŝuldo estas granda.” La mesaĝo finiĝas per jenaj vortoj: “Ni estas viaj kanadaj geamikoj kiuj partoprenas la evoluadon nuntempan de Esperanto. Ni fieras esti esperantistoj kaj provas esti bonaj kaj indaj heredantoj. Ni deziras perfektigi nian lingvan scion kaj uzi Esperanton pli ofte. Laŭ niaj personaj ebloj ni kontribuas enlande aŭ internacie por la progresigo de Esperanto.”

FONDIGIS LA PREPARA GRUPO DE YUEYANG-A ESPERANTO-ASOCIO

La nomita grupo fondiĝis en la turisma urbo Yueyang, Hunan-provinco, la 9-an de marto. Ĝia respondeculo estas Huang Qiongzhi, docento de fremdlingva literaturo de la Yueyang-a Normala Lernejo. Nun ĝi jam funkciigis Esp-kurson.

ESP-KURSO EN DAYE

Komence de marto la Daye-a Nefera Kompanio de la urbo

Huangshi, Hubei-provinco ekhavis Esperanto-kurson, en kiu studas 230 gejunuloj.

ESPERANTO EN SHASHI

Marte de la kuranta jaro la Esperanta centra studrondo de Shashi, Hubei-provinco inaŭguriĝis en la Laborista Kultura Domo de la nomita urbo. La studrondo havas 33 membrojn, kiuj ĉiuj estas eminentaj lernantoj el la 12 Esp-kursoj de la tuta urbo. La studrondo estas subtenata de la Ĝenerala Sindikato kaj Laborista Kultura Domo de la urbo kaj ĝiaj aktivadoj jam estis ampleksitaj de la Kultura Domo.

ESPERANTO-KURSO EN LIAONING-PROVINCO

La nomita kurso komencis sian aktivadon en Shenyang meze de marto. Respondeculo de la Provinca Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, la Sociologia Akademio kaj prepara komitato de la Esperanto-Asocio de Liaoning ĉestis la inaŭguran kunvenon. Ili deziris al la kursanoj sukcesojn en la lernado kaj esperis ke ili multe kontribuos al la disvastigo de Esperanto en la provinco. Krome inaŭguriĝis ankaŭ la Esp-kurso por instruistoj en la fremdlingva fakultato de la Shenyang-a Normala Instituto kaj la Esp-kurso por studentoj en la Shenyang-a Agronomia Instituto.



HONG YING:

Gazeto por Geknaboj

LA ĉinaj geknaboj havas bonan amikon, nome la semajnan gazeton “Ĉinaj Geknaboj”, kvartan, kvar-paĝan kaj dukolore presitan por 9-12-jaraj geknaboj. Inter la 54 ĉinaj porgeknabaj gazetoj ĝi estas plej bone konata kaj amata de la ĉinaj geknaboj. Ĉiusemajne oni distribuas 10,780,000 ekzemplojn.

Konsiderante la trajtojn de aĝo kaj psiko de la geknaboj, la redakcio faras artikolojn interesaj kaj facile kompreneblaj kun paĝoj ilustritaj. Jam de sia komenca periodo en la 50-aj jaroj


per kvar rubrikoj “Xiao Huzi” (Signifanta en la ĉina lingvo “Tigreto”), “Intima Fratino”, “Ĉiosciuleto” kaj “Pensema Avo” por rakonti aferojn interesantajn geknabojn kaj doni respondojn al iliaj demandoj, kio des pli forte altiras la malgrandajn legantojn.

EKZEMPLO POR LA ĈINAJ GEKNABOJ

Xiao Huzi estas heroeto en la rubriko de karikaturoserio. Li estas junpioniro vigla, aminda, honesta, bonkora, saĝa, lernema, pensema, servema kaj amika

al siaj kamaradetoj. Kompreneble ankaŭ li havas mankojn, kiel neglektemo kaj supereco-parado, kiujn havas aliaj knaboj. Tamen li ĉiam volonte korektas sian eraron, kiam li ĝin konscias. La geknaboj bone konas lin kaj prenas lin kiel sian bonan amikon, ĉar li donas al ili inspirojn kaj kuraĝigojn.

Iu knabo de Shandong-provinco diris en sia letero: “Mi ruĝiĝis, kiam mi legis en la gazeto, ke dum atendo Xiao Huzi cedis sian vicon al maljunulo kaj sin turnis malantaŭen. Foje dum aĉetado mi plenforte



legas ĝin atenteme. Mi informiĝis ne nur pri la loko de la Ŝtona Arbaro, sed ankaŭ pri ĝia formiĝo." Post la konkurso la redakcio premiis 100 bonajn respondintojn kaj honore aperigis iliajn nomojn sur la gazeto.

LA VOĈO DE GEKNABOJ

Malgrandaj legantoj skribis, ke la gazeto akurate reflektu iliajn voĉon kaj petojn. Ekz-e, iuj sendis al la redakcio leteron kun tri kokaj plumoj sur la koverto (tio montras urĝecon laŭ la ĉina moro), kaj diris en ĝi, ke iliaj instruistoj peze ŝarĝis ilin per hejmtaskoj, kio reduktis ilian ripozon; aliaj prezentis sian peton, ke la studioj projekciu al ili pli multajn porgeknabajn filmojn; triaj plendis, ke estas malfacile por ili aliĝi al la geknaba organizo — organizo de junpioniroj. . . La redakcio aperigis ilian voĉon sur la ĵurnalo por rimarkigi la koncernatojn, tiel ke iuj problemoj trovis rapidan solvon.

Foje iu vilaĝa elementlernejano skribis, ke li tre volas aĉeti vortareton, sed ĝi mankas al la librovendejo de lia gubernia urbo kaj tial li esperas ricevi helpon. Publikigo de lia letero vekis grandan eĥon. Ne nur tiu librovendejo plibonigis sian laboron sed eĉ, pli kortuŝe, varmaj leteroj kaj vortaretoj atingis lian

min antaŭenigis kaj pro tio preskaŭ faligis iun maljunulinon. La ĝentila konduto de Xiao Huzi komprenigis min, ke oni devas zorgi unue pri aliaj kaj poste pri si mem kaj respekti la maljunulojn."

PENSEMA AVO

La geknaboj estas tre scivolemaj. Ili demandas sufiĉe detale, kiam ili trovas ion novan kaj interesan aŭ kiam ilin trafas io nekomprenebla. En tiu rilato la multescia Pensema Avo ofte helpas ilin kiel konsilanto por sciencoj. Ili bombardis la avon per leteroj por lin konsulti: "Kial sputniko povas ree surteriĝi?" "Kial komputero tre rapide kalkulas?" "Kial la homaj okuloj ne sentas vintran malvarmon?" Iu knabo demandis la avon: "Vespere de la lasta sabato, mi kune kun miaj kunlernantoj ludis magneton kaj pro tio fuŝis la brakhorloĝon de panjo. Ŝi riproĉis min. Kio estas la kaŭzo?". . .

Pensema Avo respondas ĉiujn iliajn demandojn de astronomio ĝis geografio kaj krome ofte admonas ilin bone uzi sian cerbon, vekas ilian intereson por lerni sciencojn kaj kulturajn ilian kutimon por esplori aferojn.

NEMALHAVEBLA NUTRO

Krom la supre diritaj kvar rubrikoj, "Ĉinaj Geknaboj" aperigas ankaŭ artikolojn pri naturaj sciencoj, kurantaj aferoj, historio, geografio, kulturo, sporto, higieno, ĉiutaga vivo, literaturo kaj arto. La geknaboj legas tiun enhavoriĉan gazeton, kvazaŭ dronis en trezorejon de scioj. La gazeto ankaŭ ĝustatempe raportas pri iliaj utilaj aktivadoj, kiel arboplantado, malgranda scienca eksperimentado kaj lerno de ĝentilaj, civilizaj bonkvalitoj.

La gazeto ofte aranĝas iujn interesajn aktivadojn. Ekz-e, la lastan someron la redakcio organizis premio-konkurson pri gazet-legado en someraj ferioj. La ĵurnalo prezentis 12 demandojn por testi geknabojn. Iuj en la demandoj estas facile respondeblaj, se ili legis ĉiutage la ĵurnalon atente, kaj aliaj tamen bezonas ilian cerbumadon. Dum tri monatoj la redakcio ricevis 78,000 respond-foliojn. Elementlernejano de la tria klaso Li Dongdong de Anhui-provinco diris al la redakcio en sia letero: "La konkurso multe inspiris min. Antaŭe mi nur foliumis la gazeton kaj neglektis tiajn artikoletojn, kiaj formiĝo de la Ŝtona Arbaro k.a. Sed nun mi



manon unuj post aliaj el diversaj anguloj de la lando.

“NIA KULTIVEJO”

La rubrikon “Nia Kultivejo” en la gazeto servas speciale por peti kontribuojn de artikoloj kaj pentraĵoj de la geknaboj. Foje la kontribuata temo estis “Mia Amata Hejmloko” kaj baldaŭ ricevis pli ol 4,000 artikolojn. Geknaboj vive kaj emocie priskribis la fizionomion de ĉiuj partoj de la prosperiĝanta patrujo. Iuj skribis, ke en ilia hejmloko aperis fervojo, kaj la trajno fajfante preterpasas la vilaĝojn unu post alia; aliaj — ke en ilia hejmloko la fabriko meĥanizis sian produktadon; kaj triaj — ke en ilia kamparo oni flegas forston per aviadilo, kuiras per metano kaj konstruas novajn etaĝdomojn. Ĉiuj artikoloj estis saturitaj de ilia amo al sia hejmloko.

Pasintjare, kiam Unesko aranĝis mondan konkurson de infanaj poemoj, la redakcio de “Ĉinaj Geknaboj” petis, ke ĉinaj infanoj kontribuu per poemoj al tiu gazeto. Tiam manuskriptoj de infanaj poemoj kiel neĝflokaj flugis al la redakcio, kiu ricevis sume 90,000 poemojn. Kaj la plej bonaj el ili estis senditaj al Unesko. Kiel rezulte, la poemo “Ne Demandu, pro Kio Estas Tio” de la ĉina 9-jara knabo Liu

Qianqian estis elektita kiel elstaro pro sia nova verkmaniero kaj sincereco. La gazeto aperigis lian foton kaj artikolon pri lia verkado de tiu poemo. La ĉinaj geknaboj sentas gloron kaj fieron pro lia premio gajnita en la internacia poezia ĝardeno, kaj nemalmultaj el ili letere gratulis lin.

KORINKLINO AL GEKNABOJ

La gazeto “Ĉinaj Geknaboj” havas tiom da malgrandaj legantoj kaj fariĝas ilia ĉiam pli kaj pli bona mentoro, kio nedisigblas de la diligenteco de la redakcio.

La redakcio konsistas el 38 personoj, inter kiuj troviĝas pluraj veteranaj redaktoroj, kiuj laboris tie preskaŭ 30 jarojn. Grizharaj, ili havas “infanan koron”. Pro siaj oficaj devoj ĉiu redaktoro tenas rilaton kun iu difinita lernejo por koni ilian penson, observi iliajn mienojn kaj gestojn kaj kolekti interesajn historietojn. Tiel la gazeto fariĝas pli kaj pli vigla.

La redakcio starigis grupojn por gazeta kritiko en 40 ĉinaj elementaj lernejoj. Post eldono de ĉiu numero, la kritikgrupoj aŭskultas opiniojn de malgrandaj legantoj kaj ilin raportas al la redakcio. En Beijing (Pekino) la redaktoroj alterne venas al proksimaj lernejoj por okazi-

gi gazet-kritikan kunsidon. Posttagmeze de ĉiu sabato ili invitas malgrandajn legantojn al la redakcio, ke ili malkaŝe diru, kiu artikolo plej plaĉas al ili kaj kiu ne. Ne subtaksu tiujn malgrandajn legantojn! Kelkfoje ili prezentis tre akrajn rimarkigojn, eĉ tute pravajn. Ĉiufoje la redakcio serioze notis iliajn opiniojn kaj donis paciencajn respondojn al iliaj diversaj demandoj. Iu juna redaktoro diris: “Mi ekokupis min pri la gazeta laboro antaŭ nelonge kaj malmulte spertis. Mi tamen devas kiel eble plej multe kontakti kun geknaboj kaj legi librojn pri ili. Mi tre amas geknabojn kaj amas tiun gazeton same kiel ili la gazeton.”



SHAOXIANDUIKUAIBAO

Por helpi hirundojn en la nestofarado



KARAJ INFANOJ

Moderato (a duine)

Teksto kaj muziko de ZLATKO ĈURIĈ



Ka- raj in- fa- noj, ĉu vi aŭ- das min? Bo- naj a- mi- koj
Ka- raj in- fa- noj mi ek- kan- tu nun, la me- lo- di- on



el po- po- la Ĉi- ni- o, ka- raj in- fa- noj, mi sa- lu- tas vin
de la plej granda ĥo- ro, la har- mo- ni- on kiu li- gas nin



kun la sa- lu- to de Ju- go- sla- vio! Dankon por la su- no, la ru- ĝa for-
en u- ni- so- non de l'mond- infan- koro. Dankon por la su- no, la ru- ĝa for-




tu- no, kiun vi sendas al ni kun ĉi- u ma- te- no, sur la te- ro- spa- co
tu- no, kiun vi sendas al ni kun ĉi- u ma- te- no, sur la te- ro- spa- co




kie flo- ros la pa- co, ke ni es- tu jam in- fa- noj en la pacĝar- de- no,
kie flo- ros la pa- co, ke ni es- tu jam in- fa- noj en la pacĝar- de- no.



Ka- raj in- fa- noj, _____ bo- naj a- mi- koj _____



el po- po- la Ĉi- ni- o _____ ni sa- lu- tas vin _____



kun la sa- lu- to _____ kun "zdravo", "zdravo" _____



kun la sa- lu- to _____ de Ju- go- sla- vi- o _____



DEZIRAS KORESPONDI

* Piroska BARTÓK, 17-j. mezlerneeja lernantino, dez. ker. el t.m. pri muziko, literaturo, arkeologio. Adr. Str. Hărniciei, 18, Bl. 34, ap. 7. SF. GHEORGHE, Cod 4000, Rumanio.

* Mihály BÁLINT, 30-j. instruisto, dez. kor. el t.m. pri literaturo, turismo, sciencaj temoj. Adr. Cart. Ciucului, Bl. 23, Sc. C., ap. 6., R-4000 SF. GHEORGHE, Rumanio.

* Günther Gaulke, P.O. Kesto 101, BR-94400 Viamao-RS-Brazilo, dez. kor. pri interlingvistiko, Monda Lingvo, kaj interŝ. pk, pm, librojn, gazetojn, turismajn prospektojn, ktp.

* Esperantistino, 18-23 jaran el iu ajn lando de la mondo kontaktus por krei esperantistan familion: Stefano Keller, Ch. l'Entre-Bois 59, CH-1018 Lausanne, Svislando.

* Itala blindulo, instruisto en mezgrada lernejo, deziras korespondi kun tutmondaj blinduloj pri ĉiuj temoj, ankaŭ per Braille-skrib sistemo. Krom Esperante, mi parolas itale, hispane, angle kaj france. Adreso al Bagnis Romano Casella Postale 37 I-12100 Cuneo Italia.

* Emmanuel Gerarol, 8-j., rue de Cromboully, 21 B-6558-Lobbes, Belgio, deziras korespondi kun la tuta mondo, prefere kun junaj geknaboj.

* Ottmar W. van Holtz, 19-j., Poŝtako 11086 9000 Klein-Windhock, Namibio (Afriko), deziras korespondi kun ĉinaj esperantistoj pri politiko, sporto,

fremdlingvoj kaj kolektado de poŝtmarkoj.

* 26-jara polino deziras korespondi tutmonde kaj interŝanĝi diskojn. Fino Grazyna Laszczak, STR. Fabryczna 13, 32-650 Kety, Pollando.

* S-ro Ŝigejuki Torihara, 65-jara pentristo, 880 3-7-13 Tachibana-Higashi, Miyazaki-shi, Japanio, deziras korespondi kun ĉino.

* 10 gejunuloj (13-17 jaraĝaj) deziras korespondi kun samaĝuloj el ĉiuj landoj. Bv. skribi al: F-ino Astrid Beckmann, Odenwaldstr. 8, D-6113 Babenhausen 3, Fed. Resp. Germanio.

* Grazyna Laszczak (26-j), Str. Fabryczna 13, 32-650 Kety, Pollando, dez. kor. tutmonde pri ĉiu temo, precipe muziko, literaturo, politiko kaj modo.

(Daŭrigo de p. 3)

kamaradoj diris al mi, ke en la pasinta jaro la geedziĝo en tiu loko estis en tre interesa formo. Aro da gejunuloj gaje akompanis sur novaj bicikloj la novajn geedzojn en la centro, antaŭ kies bicikloj pendis granda ruĝa paperfloro.

Forlasinte la antaŭan digon de la Flava Rivero, nia aŭto veturis en vastan malaltan ebenaĵon. Tie estis malnova fluejo de la rivero. En la pasinteco ne troviĝis, pro serioza salalkalo, eĉ unu arbo sur 5-kilometrojn-longa vojo. Tie estas la nomita brigado.

Tamen hodiaŭ ankaŭ Quantou-brigado aliĝis. Ekde 1979 ĝi ŝanĝis sian malriĉan fizionomion kaj ne plu bezonas grenon provizitan de la ŝtato. En 1980 ĉiu persono de la briga-

do enspezis meznombro 110 juanojn. Inter la dek taĉmentoj sub ĝi sep kvitigis la ŝtatajn ŝuldojn de pli ol 20 jaroj kaj konstruis novajn domojn kun pli ol 300 ĉambroj.

La bopatro de mia akompananto loĝas en tiu brigado. El la 6 membroj de lia familio 3 kapablas labori. Ili terkulturas 0.6 hektaron da fiksitaĵoj. En la lastaj du jaroj ili ĉiujare ricevis 1,500 kg. da greno kaj enspezis pli ol 1,000 juanojn. Tial lia familio aĉetis du brakhorloĝojn, unu stebilon, konstruis domon kun du ĉambroj kaj krome edzigis lian filon.

Kiam mi estis en Lankao, mi vizitis pli ol 20 brigadojn de 3 komunumoj kaj ĉie vidis prosperon kaj ĝojon.

Ĉar mi restis mallonge en Quantou-brigado, mi ne trovis la

almozpetintajn patrinon kaj ŝian filinon. Oni diris al mi ke ĉiuj fuĝintoj de tiu loko jam revenis kaj lastjare lokanoj jam ne plu fuĝis aliloken pro vivopano.

* "Sistemo de produkta respondec" estas sistemo de administrado de la popola komunumo, t.e. difini la taskon de produkta grupo kaj laborula individuo; difini la nombron de laboruloj, laborpagon, laborajn taskojn, kvaliton, premion kaj punadon. Laŭ tiu sistemo la produkta taĉmento povas asigni agrikulturajn laborojn al produkta grupo, familio aŭ individuo kaj donas laborpagon laŭ la produkto-kvanto. Tiu sistemo forigis la malbonajn tendencojn en la pasinteco — malŝparon de laborfortoj kaj egalismen en distribuado, sen konsidero pri laborkvanto kaj kvalito. Ĝi enkorpiĝas en si la socialisman principon de distribuo laŭ laboro kaj plialtigas laboran aktivecon de la komunumanoj.

Pentraĵoj de Gejunuloj

Post neĝado (olepenetraĵo)
de MA ZENGGAN



EN la printempo de la kuran-
ta jaro la ĉinaj kulturaj kaj
belartaj rondoj kaj porjunulaj
institucioj okazigis la duan
tutlandan belartan ekspozicion
kun 516 belartaj verkoj de geju-
nuloj, inter kiuj troviĝas ole-
penetraĵoj, ksilografaĵoj, skulpta-
ĵoj kaj novjaraj kaj ĉinstilaj
penetraĵoj. Ĉiuj ĉi verkoj plenaj
je vivetoso klare spegulas gran-
dan ŝanĝon, kiun travivas nun la
ĉina popolo. Multaj el ili espri-
mas la esperon, postulon, ĝojon
kaj zorgon de ĉinaj gejunuloj,
presentante ilian realan vivon.
Tiuj verkoj per siaj koloroj,
strekoj kaj klaroskuro vidigas
kuraĝan kreadon de la junaj
belartistoj. La penetraĵo “Kon-

tribuo” prezentas junulon ver-
kantan ĉe tablo kun diversaj
libroj, gazetoj kaj materialoj en
varma somera tago. La olepen-
etraĵo “Aspiro” vidigas, ke iu
knabino amputita je kruro kun
lambastono legas serioze antaŭ
librobretaro en biblioteko. Sia
portata ladboto kaj duonman-
ĝita pano flanken metita montris
ŝian avidecon je scioj. La pen-
etraĵo “Servo” prezentas, ke iu
juna prizorganto de bicikloj antaŭ
kinejo tenas libron en mano por
ĝin legi en ĉiu libera minuto.
Inter la gejunuloj troviĝas ta-
men ankaŭ senidealaj ĝuemuloj.
La olepenetraĵo “Vojo” ja pri-
skribas tian junulon. Li en vestoj
de stratulaĉo vagadas tien kaj

Ujgura knabino (olepenetraĵo)

de ZHANG FANGHUA



tien. Sed la aliaj en la pentraĵo klopodas por sin klerigi. Kiel multe ne akomodiĝas al nia tempo tiu junulo! Alia pentraĵo "Medito" kun originala gusto prezentas iun belstaturan kaj mode vestitan laboristinon, kiu meditas antaŭ honortabulo, kun mallevita kapo kaj manoj sur balustrado. Eble ŝi demandas sin mem: "Kia mi estis kompare kun tiuj elstaraj laboristoj?"

En tiu ekspozicio 2 verkoj ricevis la unuagradan premion, 36 — la duagradan kaj 115 — la triagradan. Inter la 2 verkoj kun unuagrada premio unu estas ksilografajoserio titolita "Qiu Jin", kiu prezentas la heroaĵon de martirino Qiu Jin en la ĉina malnov-demokratia revolucio. La alia estas olepentraĵo "Pa-

tro", kiu priskribas iun pli-ol-60-jaran kamparon trinkantan dum laborpaŭzo. Lia sunbruna kaj sulkoplena vizaĝo olebrilas en forta lumo. La aŭtoro imitis pentrarton de okcidentanoj. Per sia subtila pentromaniero li prezentis la afablecon, bonkorecon kaj honestecon de la persono. Tiu pentraĵo per sia sorĉa forto de arto tiel impresis la rigardantojn, ke ili kvazaŭ flarsentis kamparon.


Tiuj, kiuj kontribuis siajn verkojn al la ekspozicio, estas 16-35-jaruloj. Kvankam iuj el ili ne estas sufiĉe lertaj, tamen ili akiris bonajn sukcesojn. Ili faris kuraĝajn provojn en enhavo, tekniko, esprimmaniero kaj arta stilo. Evidente, ili estas nova multesperiga generacio de la ĉinaj belartaj rondoj.



Patro (olepentraĵo)
de LUO ZHONGLI

Heroino Qiu Jin (serio de lignogravuraĵoj): 1. Antaŭ la viktimiĝo, 2. serĉi la veron, 3. ŝi bolas de patriotismo, 4. kunjuri, 5. leviĝo, 6. anonco pri ŝia kondamno, 7. brave marŝi al la ekzekutejo. Qiu Jin estis revoluciistino en la lastaj jaroj de Qing-dinastio, unu el la gravaj membroj de la revolucia asocio Guangfuhui kontraŭ Qing-dinastio. Ŝi naskiĝis en Shaoxing de Zhejiang-provinco en 1875 kaj viktimiĝis en 1907. Per kuraĝaj artmanieroj, duraj linioj kaj drastaj nigroblankaj kontrastoj, la aŭtoro unuspire kreis la brilan figuron de la revoluciistino batalanta kontraŭ la malluma socio.

de WANG GONGYI



Antikvaĵoj de Quanzhou

de YU ZHONGWEN

MULTAJ antikvaĵoj ankoraŭ troviĝas nun en Quanzhou, kiu fariĝis fame konata haveno de eksteraj komercoj de Ĉinio jam antaŭ mil jaroj.


Veturante suden de Fuzhou, la ĉefurbo de Fujian-provinco, oni vidas ŝtonan ponton super Luoyang-rivero, kiun limtuŝas Hui'an kaj Quanzhou. La ponto nomata Luoyang 834 metrojn longa kaj 7 metrojn larĝa estis konstruita en la mezo de la 11-a jarcento. Ĝi estis nepre trapasejo de norda Fujian al Quanzhou. Laŭ noto de historia

literaturo la antikva ponto longis je 1,200 metroj kaj sin ornamis per multaj ŝtonskulptaĵoj, apud ĝi staris 9 budhismaj pagodoj kaj sur ĝi 7 kioskoj. Ĝi famiĝis tra la tuta lando pro sia grandiozece kaj beleco. En la pasintaj pli ol 900 jaroj la ponto estis riparita 17 fojojn, tamen ne perdis sian originalecon kaj imponecon. En la jaro 1973 oni konstruis kontraŭtandem kluzponton proksime de la ponto en ĝia okcidento. Nun ĝi estas protektata kiel unu el la gravaj historiaj objektoj, kaj estas malpermesite al ŝarĝaŭtoj trapasi ĝin.

Enirinte la urbon Quanzhou, oni povas vidi de malproksime paron da altaj antikvaj pagodoj en Kaiyuan-templo.


La nomita templo estis ekkonstruita en la jaro 686 en Tang-dinastio. En la komenco ĝi estis nomata Lotuso-templo. Laŭdire, en antikveco tie estis morusarba ĝardeno. Iunokte la mastro de la ĝardeno sonĝis, ke bonzo petas de li la lokon por konstrui templon, sed li ne volis sukcesigi la aferon, dirante: "Se sur la morusarboj de mia ĝardeno floros lotusfloroj, mi

Luoyang-ponto




Fotoj de ZHANG WEI

Antikva pagodo de
Quanzhou




Muro kun bareliefo
de Tang-dinastio






Song-dinastia ŝtona Laojun, la fondinto de daoismo

Pavilono konstruita en Song-dinastio





Flugantaj feinoj en la Mahavira Halo





Antikvaj kaligrafajoj sur ŝtono en Nanshan



Ŝtona kolono kun skulptita drako de Song-dinastio

Ŝtono Moviĝanta en Vento





FOTOJ PRI NATU-
RAJ BELAĴOJ FA-
RITAJ DE E-ISTOJ

Pejzaĝo de Vlaardingen
de G. KALKMAN
(Nederlando)



cedos la ĝardenon por konstrui templon." Post kelkaj tagoj sur la morusarboj vere ekfloris lotusfloroj. Pro tio ĝi ricevis la nomon Lotusotemplo. Nun, okcidente de la palaco de la templo ankoraŭ kreskas antikva morusarbo kies trunko splitiĝis en tri partojn kun prosperantaj folioj. Apud la arbo staras tabulo kun la vortoj "Moruso-Lotuso".

La nomita templo plurfoje ŝanĝis sian nomon. En la jaro 738 p.K., t.e. la 26-a jaro de Kaiyuan-erao de Tang-dinastio, imperiestro Xuanzong arde kredanta je budhismo donis dekreton, ke oni konstruu po templon en ĉiuj gravaj urboj kaj nomu ilin per la sama nomo "Kaiyuan".

La beleco de arkitektura arto kaj nombro de antikvaj skulptaĵoj de Kaiyuan-templo de Quanzhou multe superis tiujn de ĉiuj aliaj temploj. Ĝia halo Mahaviro havas ĉ. 100 altajn kaj dikajn kolonojn el granito, tial ĝi portas alian nomon Centkolona Halo. En la kuntuŝiĝejoj de la kolonoj kaj traboj troviĝas 24 "flugantaj muzikistinoj" en malsamaj pozoj. Ili tute diferencas de la flugantaj feinoj ŝtonskulptitaj en Hindio kaj de tiuj en freskoj de Dunhuang. Ili impresas ne per svelteco, sed per graseteco. Ili, kun nudaj brusto kaj brakoj, havas birdpiedojn kaj flugilojn surdorse, portas gazan jupon, tenas diversajn muzikilojn kaj donacaĵojn en la manoj kaj subtenas la kolonojn per belaj kronoj surkapaj. Ili servas ne nur kiel subteniloj, sed ankaŭ kiel delikataj ornamaĵoj maloftaj en nia arkitekturo.

Estas menciinde, ke en tiu tipe ĉina antikva templo sin trovas egipta kaj greka plastiko. Sur la antaŭa bazmuro de bazamento de la Mahavira halo estas 72 bluŝtonaj sfinkso-reliefoj de antikva egipta stilo, el kiuj iuj havas virinan kapon kaj leonan korpon kaj aliaj viran vizaĝon kaj ŝafan korpon. La du bluŝtonaj kolonoj en la mezo de la koridoro malantaŭ la halo estis konstruitaj laŭ arkitektura stilo de

Abonu kaj Abonigu El Popola Ĉinio

ABONTARIFO

Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	\$A	5.70	9.60	14.40
Aŭstrio	Sch	81.60	136.00	204.00
Belgio	BF	180.00	300.00	450.00
Britio	£	3.00	5.00	7.50
Finnlando	FMK	24.00	40.00	60.00
Francio	FF	26.40	44.00	66.00
FR Germanio	DM	10.80	18.00	27.00
Italio	Lit	5280	8800	13200
Japanio	Yen	1400	2800	4000
Nov-Zelando	NZ\$	6.70	11.20	16.80
Svisio	SF	10.50	17.60	26.40
Usono	US\$	6.00	10.00	15.00
Kanado	Can\$	7.20	12.00	18.00
<i>Por aliaj landoj en Eŭropo:</i>				
	£	3.00	5.00	7.50
	US\$	6.00	10.00	15.00
<i>Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:</i>				
	£	2.20	3.60	5.40
	US\$	4.30	7.20	10.80

Specimeno havebla ĉe nia ĝenerala distribuanto: Esperanta Sekcio de Guoji Shudian, P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

la antikva Grekio kaj sur ili estas reliefaj bildoj pri bramanismo. Multaj el tiuj ŝtonskulptaĵoj estis ornamaĵoj por religiaj konstruaĵoj de la Mezepoko, kiuj perdiĝis en diversaj lokoj de Quanzhou, kaj poste en Ming-dinastio (1368-1644 p.K.) oni transportis tiujn skulptaĵojn kaj per ili ornamis la templon Kaiyuan. Nun ili jam fariĝis valoraj artaĵoj por studi la antikvan arkitekturon.

La supre menciitaj pagodoj starantaj respektive sur la placoj orienta kaj okcidenta de la halo estas kvinetaĝaj okangulaj konstruaĵoj. La orienta pagodo alta je 48.24 metroj kaj la okcidenta je 44.60 metroj estis konstruitaj respektive en la jaroj 865 kaj 916. La antaŭaj pagodoj estis lignaj, kaj la nunaj estis rekonstruitaj el granito en la 13-a jarcento (Song-dinastio). La pagodoj havas ŝtu-

petarojn kondukantaj al ilia supro de kie oni povas rigardi la tutan urbon. Sur ĉiu etaĝo de la pagodo sidas 16 ŝtonaj budho-statuoj delikate skulptitaj en diversaj mienoj. La soklo de la orienta pagodo havas 39 bluŝtonajn reliefajn bildojn pri Ŝakjamunio kaj sutro.

Oriente de Kaiyuan-templo estis nove konstruita ekspoziciejo, kie montriĝas ŝipo elterigita en 1974 je 4 metroj sub la plaĝo de Quanzhou-golfo. Ĝia korpo longas je 24.20 metroj kaj larĝas je 9.15 metroj. Ĝi estis konstruita en Fujian en la 12-a aŭ 13-a jarcento. Tie eksponiĝas kune kun ĝi elterigitaj parfumaj lignoj, medikamentoj, pipro, hidrargo k.a. Ĝia elteriĝo skuis Ĉinion kaj aliajn landojn, ĉar ĝi estas la unua elterigita antikva ŝipo valora por studi la historion de la ĉina ŝipfarado kaj la historion de eksterlanda navigado de Quanzhou.

Ekster la orienta pordo de Quanzhou troviĝas la vilaĝo "Sanktulaj



Tomboj", kiu tiras al si multajn turistojn. La vilaĝo situas ĉe la piedo de Lingshan-monto kun verdaj pinoj kaj akacioj, inter kiuj kuŝas multaj tomboj kun slabo, inkluzive de tiuj de du famaj misiistoj. Laŭ historia literaturo, en la 7-a jarcento Mohamedo sendis 4 misiistojn al Ĉinio. Unu el ili faris misian predikadon en Guangzhou, alia en Yangzhou kaj tria kaj kvara en Quanzhou. La lastaj du mortis en tiu ĉi urbo kaj estis enterigitaj ĉe la piedo de Lingshan-monto. Por memorigi pri tiuj du amikaj kulturaj pioniroj, la tiea popolo nomis iliajn tombojn "Sanktulaj Tomboj" kaj ankaŭ la vilaĝon per la sama nomo.

Ĝis nun la tomboj kun granita slabo estis bone konservataj en pavilono ĉe la monttalo, ĉirkaŭita de duoncirkla ŝtonkoridoro kun 5 slaboj interne. La meza slabo starigita en la jaro 1323 notis en la araba lingvo la farojn de la du misiistoj. Sur la dekstra tomboŝtono estis registrita la pilgrimado de fama navi-

gisto de Ming-dinastio Zheng He en 1417. En la periodo de 1405-1433, komisiite de la kortego li sepfoje komandis grandan ŝiparon en navigado al malproksimaj landoj, kiu foje eĉ atingis la orientan bordon de Afriko kaj la buŝon de la Ruĝa Maro. Li pilgrimis al la Sanktulaj Tomboj antaŭ ol ekfari la kvinan navigadon ĉe Quanzhou.

Islamo enkondukiĝis en Ĉinion ĉ. 651 p.K. Depost tiam granda nombro da araboj, persoj, sirianoj kaj sudorient-azianoj venis al Quanzhou por komercado, vojaĝo kaj misiado, kaj koncentre loĝis sude de la urbo. Krom la tomboj, nun ankoraŭ restas Qingjing-templo sur Tumen-strato de la urbo. Ĝi estis konstruita en la komenco de la 11-a jarcento subvenciite de fremdlandaj islamanoj loĝantaj en Ĉinio. La esplorado montris, ke la templo estis konstruita imite al la araba moskeo. Ĝia majesta ogivportalo estas tre bone konservita. Ĝi estis masonita el bluŝtonoj kaj granito, kun alteco de 20 metroj kaj larĝeco de 4.5 metroj. La portalo konsistas el tri partoj ekstera, meza kaj interna, kaj la du antaŭaj partoj havas volbajn plafonojn. Sur la ebena tegmento de la portalo estas la Lunrigarda Balkono nomata "Rigardo al la Luno". Qingjing-templo estas unu el la famaj moskeoj nun ekzistantaj

"Ŝtona Bambuĝermo" — Antikva gravuraĵo




en Ĉinio kaj listigita de la ŝtato kiel grava historia restaĵo.

Plejparto de la antikvaj restaĵoj de Quanzhou koncentre lokiĝas sur Qingyuan-monto en ĝia norda antaŭurbo. Nun ĝi kiel pitoreskejo estas en konstruado. Sur la monto el nigrebrunaj rokoj ĉie kreskas densaj arboj, kaj montriĝas ĉarma pejzaĝo.

Ĉe la montpiedo staras ŝtona statuo de Laojun, la kreinto de taoismo. Frue en la Okcidenta Jindinastio (265-420 p.K.) jam konstruiĝis taoisma templo en Quanzhou. En la komenco la statuo staris en la templo kaj poste sub la ĉielo pro ruiniĝo de la templo. La statuo el sola ŝtonego altas je 5.1 metroj, larĝas je 7.3 metroj kaj dikas je 7.2 metroj. La vizitantoj tre ŝatas sin foti antaŭ la ridanta ŝtona maljunulo.


Sur Qingyuan-monto je 20 km. longa punktiĝas temploj kaj kaŝiĝas 36 ŝtonkavernoj zigzagaj kaj interesaj. Inter ili la plej alloga estas Mituo-kaverno. En ĝi estas ne nur budhostatuo de Amitabo je 6 metroj alta, sed ankaŭ 285 ŝtonpecoj kun gravuritaj kaligrafiaĵoj de famaj personoj de diversaj dinastioj de post la 10-a jarcento. Vizitante la lokon kaligrafoj-turistoj ĉiam volas restadi pli da tempo por ĝui la skribarton.



Mituo-roko de Qingyuan-monto de Yuan-dinastio (1279-1368 p. K.)



Sipo de Song-dinastio (906-1279 p. K.) elterigita ĉe Houzhugang-haveno de Quanzhou-golfo en 1974



RUĜA TRAPO

(Popola rakonto)

ONI diras, ke en Xu-vilaĝo ĉe la lago Nanhu de Jiaxing vivis patrino kaj filino, kiuj sin vivtenis per bredado de fiŝoj kaj kulturado de trapo. La filino estis tre diligenta kaj la trapo kulturataj de ŝi kreskis plej bone. Ŝi portis tutjare ruĝan veston. Vidante ŝin remanta tien kaj tien en trapo-kuvo sur la lago kun sia figuro spegulata en la klara akvo, oni admiris: “Jen, freŝa ruĝa trapo ĵus elkreskinta el la akvo!” Kaj sekve ŝi ricevis la nomon Ruĝa Trapo.

En tiu tempo, la lago estis sub la posedo de la loka tirano Tigro Wang kaj ĉiu trapokulturisto kaj fiŝbredisto ĉe ĝi devis pagi al li renton, kiu estis levata je ŝveligo de la lago pro pluvo, tamen ne mallevata je malŝveligo de la lago. Se ekpluvis, Tigro Wang tuj ekkriaĉis: “La lago akvoplenas! Profunda akvo povas kreskigi fiŝegojn kaj dikajn trapfruktojn. Pro bona rikolto, vi devas pagi al mi pli multe!”

Se okazis trosekeco, fiŝoj turnis sian ventron supren pro manko de akvo, trapo flaviĝis kaj la fiŝistoj pluve larmegis. Tiam Tigro Wang intence sin kaŝis, kvazaŭ li nenion sciis pri la situacio, kaj kolektis

renton kiel kutime, pro kio la loĝantoj eĉ ne povis havigi al si dufoje kaĉon en ĉiu tago.

En iu jaro, pluvo favoris, la lago havis sufiĉe da akvo, la suno ardis kiel fajro. Ruĝa Trapo kune kun aliaj knabinoj forigadis fiherbojn surlage spite al la varmego, remante en kuvoj. “La sesan de l’ sesa monato, kreskegas rapide la trapo.”

Tiam estis la plej bona sezono por kreskado de trapo.

Ruĝa Trapo kolektis fiherbojn kun la kapo klinita. Ŝi sin klinis kaj eltiris faskon da herbo. Ŝi flanken ŝovis la trapojn kaj eltiris ambaŭmane fiherbojn tufo post tufo, kaj tiel laborante ŝi alproksimiĝis iom post iom al la bordo. Ŝi ne aŭdis la bruon de la forflugantaj



ardeoj post ŝia dorso, nek rimarkis la subite forpafiĝantajn fiŝojn en la akvo, nek atendis, ke surborde alproksimiĝis Tigro Wang, kies malbela figuro speguliĝis apud ŝia trapo-kuvo.

Tigro Wang alvenis por kontroli la ŝveliĝon de la lago, ĉar li intencis altigi la renton. Subite li rimarkis Ruĝan Trapon. Ho, kiel bela knabino! Li tute stuporiĝis kun mirego kaj eĉ ne kuraĝis ekkrii, timante ke ŝi surpriziĝos kaj forfuĝos. Li etendis sian manon por kapti la kuvon, sed la kuvo formoviĝis. Li faris plurajn provojn kaj enakviĝis senkonscie. "Ho, panjo!" li falis en la lagon kun ekkrio.

Aŭdinte plaŭdon kaj la ekkrion, Ruĝa Trapo sin turnis, kaj vidinte ke iu falis en la akvon, ŝi tuj helpis lin surbordiĝi. Tigro Wang ege ĝojiĝis, vidante ke lin savis neniu alia ol Ruĝa Trapo, liaj naztruoj tremetadis pro ekscitiĝo. Li kaptis ŝin kriadante: "Brava knabino!" Tion vidinte, aliaj knabinoj alarmis el centro de la lago: "Ruĝa Trapo! Li estas Tigro Wang! Tuj forfuĝu!"

Aŭdinte ke la savito estas Tigro Wang, Ruĝa Trapo teruriĝis. Ŝi faligis lin kun la kapo malsupren per ekpuŝego, saltis en sian kuvon kaj per puŝoj de la remilo forlasis la bordon kaj malaperis en la trapokreskejo.

Tigro Wang sin levis, kaj rimarkinte ke Ruĝa Trapo forfuĝis, li kriis piedfrapante la teron: "Ruĝa Trapo, Ruĝa Trapo, provu iri en la ĉielon aŭ la teron, vi tamen ne povos eskapi el mia mano!"

Hejmen reveninte, li elprenis la aktojn pri luado kaj monprunto subskribitajn de fiŝistoj de Nanhulago kaj kunvenigis la lastajn. Li deklaris al ili: "Mi volas preni



Ruĝan Trapon kiel mian kromedzinon. Kiu el vi sukcesos svati ŝin por mi, mi forbruligos liajn aktojn kaj rekompencos lin per oro kaj arĝento. Se vi ne sukcesos, mi postulos de vi pliajn 50 kilogramojn da fiŝoj por ĉiu muo (1/15 hektaro) da bredejo kaj 250 kilogramojn da trapofruktoj por ĉiu peco da trapokultivejo."

Tion aŭdinte, la fiŝistoj tuj ekgrumblis brue: "Jen denove diablaĵo de Tigro Wang!" "Kiel bona knabino estas Ruĝa Trapo! Se ŝi falos en lian manon, certe sekvos malbono el tio!" "Ĉu tio ĉi ne signifas kateni nin kaj ne lasi nin plu vivi?"

Informiĝinte pri tio, Ruĝa Trapo tiel indigniĝis, ke ŝiaj okuloj flamiĝis kaj ŝia koro tremetis.

En la sekvanta mateno, Ruĝa Trapo aperis, post zorga sinordigo, antaŭ la pordo de Tigro Wang por lin vidi.

Informiĝinte ke Ruĝa Trapo mem alvenis, Tigro Wang haste elĉambrigiĝis kaj kriis al ŝi: "Kara knabino, bonvenon! bonvenon!"

Tion dirante li etendis la manon por preni Ruĝan Trapon. Tiu ĉi forte eltiris sian manon dirante: "Ĉu vi vere amas min?"

"Jes, jes, se mi vin trompus, min trafus akcidenta morto! Se vi edziniĝos al mi, vi administros la tutan bienon, kaj el miaj unua, dua, ... oka, naŭa edzinoj neniu estos permesita vin ofendi," Tigro Wang juris per la ĉielo palpante siajn lipharojn kaj nazon, kaj frapante al si la bruston.

"Mi volas pririgardi vian tutan posedajon!" diris Ruĝa Trapo.

Tigro Wang tiam pensis, ke ŝi do jam konsentis edziniĝi al li, kaj tuj ekkriis kun freneza ĝojo: "Ruĝa Trapo jam edziniĝos al mi! Ŝi edziniĝos al mi!"

Aŭdinte tion, la fiŝistoj svarmiĝis antaŭ lia domo. Vidinte ke Ruĝa Trapo flegme staranta en la korto volas pririgardi la riĉaĵojn de Tigro Wang, iuj riproĉis ŝin, ke ŝi ŝanĝiĝis, aliaj diris, ke ŝi intencas savi la mizerulojn.

Tigro Wang elportis monton da oro, arĝento kaj aktoj pri luado kaj monprunto, murmurante: "Vidu, jen silkaĵoj, kestoj grandaj kaj malgrandaj, ankoraŭ multe da aliaj!"

Tiam Ruĝa Trapo diris: "Nu ĉesu, unue mi volas vidi, kiel granda estas la akvokultivejo sub via posedo. Kunportu la aktojn, por ke mi vidu kiu peco da akvokultivejo estas luita al kiu!"

"Bone, tre bone!" konsentis Tigro Wang kun larĝa rido, kapjesante.

Ruĝa Trapo venis kun Tigro Wang al la lago. La lasta sendis venigi boaton, sed Ruĝa Trapo haltigis: "Mi kutimiĝis veturi en trapo-kuvo. Ĉu estas ne bone se ni prenu la kuvon?"

Tigro Wang sentis, ke lia koro preskaŭ saltis el lia buŝo pro ĝojego, kaj li tuj konsentis: "Bone, tre bone! Mi stultiĝis de grandaĝeco, ke mi preterpensis tian ideon. Ni veturu per trapo-kuvo! Jes, trapo-kuvo!" Tion dirante, li mansignis al siaj viroj, ke ili ne sekvu lin. Ruĝa Trapo altiris grandan trapo-kuvon kaj diris, ke Tigro Wang unue eniru kun la akto-kesto; poste ankaŭ ŝi lerte eniris ĝin, kaj sidiĝinte vidalvide al Tigro Wang, ŝi remis malrapide al la mezo de la lago.

En la lastaj tagoj Tigro Wang forpelis ĉiujn de sur la lago, kie nun regis silento kaj dezerteco. Remante, Ruĝa Trapo eklarmis pretervole. Tion rimarkinte, Tigro

Wang tuj demandis ŝin: "Kio okazis al vi? Pro kio?"

Tigro Wang etendis sian manon por preni Ruĝan Trapon, sed tiu sin retiris ekbalancante la kuvon. "Ho ve!" li ekkriis, "atentu, ke la kuvo ne renversiĝu!"

Sed Ruĝa Trapo ankoraŭ pli forte balancis la kuvon kaj kriis kun severa mieno: "Tigro Wang, ĉu vi volas morti aŭ vivi?"

Vidinte ke la mieno de Ruĝa Trapo ŝanĝiĝis, Tigro Wang konsterniĝis kaj tuj diris: "Knabino, ĉi tie estas la mezo de la lago, ne ŝercu! Ni reiru!"

"Porkaĉo! Ci ankoraŭ deziras reiri?" insultis lin Ruĝa Trapo. "Mi lasos vin morti per natura morto!"

Kun tio, ŝi denove balancis la kuvon tiel timigante Tigron Wang, ke li krie petadis indulgon.

"Vian vivon mi indulgos," diris Ruĝa Trapo, "se vi elprenos la aktojn el la kesto kaj ilin ĵetos en la akvon!"

Sed Tigro Wang ja ne volis tion! Rimarkinte lian heziton, Ruĝa Trapo forte balancis la kuvon tiel, ke akvo plaŭdis en ĝin. "Helpon! Helpon!" Tigro Wang kriaĉis kvaŝaŭ buĉata porko. "Mi ĵetos, ĵetos!"

Sed li firme tenis la kesteton sen volo ĝin ellasi! Ruĝa Trapo ekflamiĝis de indigno, deprenis ĝin, elprenis la aktojn kaj ilin disŝiris. Tio


estis por Tigro Wang distranĉo de lia karno. Li sin ĵetis kontraŭ Ruĝan Trapon, kaj tiu ĉi donis al li laŭmovan ektiron. Renversiĝis la trapo-kuvo kaj ili ambaŭ falis en la akvon. La luktado daŭris en la akvo. Ruĝa Trapo estis lerta en naĝado, sed ŝi ne povis sin liberigi el la manoj de Tigro Wang. Fine Tigro Wang ĉesis spiri kaj elĉerpigis la energio de Ruĝa Trapo. . .

La lakeoj de Tigro Wang longe atendadis lin sur la bordo, sed vane. Fine ili prenis boaton kaj remis mezen de la lago por lin serĉi. Ha, ili vidis la trapo-kuvon renversita kaj la dikan korpon de Tigro Wang flosanta sur la akvo.

La fiŝistoj dolore ĉagreniĝis. Ili klopodis eltrovi la korpon de Ruĝa Trapo ĉie remante en trapo-kuvoj. La profundejojn ili traserĉis per retoj kaj la malprofundejojn per palpado, sed nenie ili ŝin trovis.

En la sekvanta tago, iu knabino, ĉagrene staranta sola ĉe la lago, subite vidis brilan ruĝaĵon en la akvo. Ŝi pensis ke tio estas Ruĝa Trapo! Vokante la nomon de la knabino, ŝi klopodis kapti la ruĝaĵon per pinĉilo. Ĝin elakviginte, ŝi trovis, ke ĝi estas arego da ruĝaj trapoĵoj. Ŝi portis ilin al la aliaj kaj ĉiuj konstatis, ke tia bela ruĝa trapo estis neniam vidita antaŭe. Ili pensis, ke la knabino turniĝis en ruĝan trapon, tial oni komencis nomi tian trapon "ruĝa trapo".

Redaktita de **CHEN WEIJUN**
Ilustrita de **JIANG FAN**



Dialogo inter du filozoj


Foje Zhuangzi kaj Huizi* kune vizitis la riveron Haoliang. Vidante la fiŝojn naĝantaj senĝene kaj trankvile en la rivero, Zhuangzi ekkriis: “Ho, kiel ĝojaj la fiŝoj estas!”

Huizi diris: “Vi ne estas fiŝo, kiel do vi scias ilian ĝojon?”

Zhuangzi respondis: “Vi ne estas mi, kiel do vi scias ke mi ne scias ilian ĝojon?”

Huizi diris: “Mi ne estas vi, vere mi ne scias ĉu vi scias la ĝojon de la fiŝoj aŭ ne. Vi ja ne estas fiŝo, kiel do vi povas scii ilian ĝojon? Tio estas tute simpla kaj klara!”

*Zhuangzi (369-286 a.K.) kaj Huizi (ĉ. 370-310 a.K.) vivis en la periodo de Militantaj Regnoj (475-221 a.K.).



Ilustrita de Miao Yintang

Lanco kaj ŝildo

En Chu-regno estis vendisto de lanco kaj ŝildo.** Li diris, ke lia ŝildo estas tiel fortika, ke nenia lanco povas ĝin difekti. Samtempe li diris, ke lia lanco estas tiel akra, ke ĝi povas trapiki ŝildon kiel ajn fortikan. Unu preteriranto demandis lin: “Se mi pikus vian ŝildon per via lanco, kio do okazus?” La vendisto ne povis doni respondon.

** En la ĉina lingvo “lanco” estas “矛” (mao) kaj “ŝildo” estas “盾” (dun). La kunmetitaj vortoj “矛盾” (maodun) signifas kontraŭdiron. Tiu ĉina idiotismo devenas de la supre dirita fablo.

Elĉinigiĝis ĈEN ĈAŬJIN



Ilustrita de Miao Yintang



Taras Ševčenko

Poeto kaj pentristo T. Ševčenko

La 10-a de marto ĉi-jare estis la 120-a datreveno de la forpaso de la granda ukraina poeto kaj pentristo Taras Ševčenko. Por memorigi tiun eminentan demokratian batalanton, ĉi tie ni publikigas lian mallongan biografion verkitan de s-ro Yustyb Kuzma el Kanado kaj la Esperantan tradukajon de lia poemo "Testamento".

— La Red.

La 9-an de marto 1814 naskiĝis en ukraina vilaĝo la plej granda poeto kaj profeto de tiu lando, signifa pentristo kaj unu el la plej grandaj poetoj de la mondo nome Taras Ševčenko.

En la jaro 1964, okaze de la 150-a datreveno de la naskiĝo de la poeto, je la propono de UNESKO, ne nur Ukraino sed ankaŭ multaj aliaj landoj festis tiun datrevenon. Liaj verkoj estis tradukitaj en multajn lingvojn inkluzive ĉiujn slavajn lingvojn. Lia "Testamento" estas tradukita en 57 lingvojn inkluzive de Esperanto, en kiu aperis ankaŭ lia longa poemo "Katerino" kaj kelkaj aliaj poemetoj.

Ševčenko travivis sian infancon en granda mizero. Li naski-

ĝis en malriĉa servutula familio. En lia 9-jara aĝo mortis lia patrino. Lia patro denove edziĝis al vidvino kun propraj infanoj. En la domo ekestis vera infero. Post du jaroj mortis ankaŭ lia patro kaj li fariĝis vera orfo.

Malgraŭ tiuj mizeraĵoj la knabo havis grandan inklinon kaj deziron versi kaj pentri.

En tiuj tempoj ne ekzistis popollernejoj en sklavvilaĝoj. Por Ševčenko ne estis facile trovi homon, kiu instruus lin legi kaj skribi. En tiu tempo diakonoj sin okupadis pri popolinstruado, sed ili mem estis ofte malmulte klerigitaj kaj ofte ebruloj. Ofte okazis, ke Ševčenko estis batata aŭ, kiel oni

diris en lernejoj, li ofte manĝis "betulan kaĉon".

Lerninte iom legi kaj skribi, la knabo komencis serĉi homon, kiu instruus lin pri pentrado. Sed estis ne facile trovi bonan pentriston. Interese estas, ke unu pentristo ekzamenis la manplaton de Ševčenko kaj konkludis ke li ne havas kapablon por pentrado.

Fine li renkontis pentriston, kiu konsentis instrui lin pri pentrarto. Ševčenko estis tamen servutulo kaj pro tio la pentristo postulis de li, ke li akiru permeson de sia mastro aŭ de lia administranto.

La administranto ne donis permeson kaj kontraŭe ordonis eĉ, ke Ševčenko laboru en kui-

rejo kaj poste kiel lakeo de mastro Engelhardt. Ne ŝatante senlaborecon Ŝevĉenko estis devigita silente atendi dum horoj en la antaŭĉambro por iu ajn ordono de la mastro, ekzemple alporti akvon aŭ pipon.

Sed la sorto ŝanĝis tion favore al Ŝevĉenko. Foje, kiam mastro Engelhardt forveturis kaj devis reveni la sekvantan tagon, Ŝevĉenko eklumigis kandelon kaj komencis pentri. Li kopiis unu el la multaj pentraĵoj en la ĉambro. Subite la mastro revenis antaŭtempe kaj ekvidis lin pentranta en kandellumo. La mastro treege ekkoleris pro timo, ke la kandelo povus ekbruligi la palacon kaj ordonis severe puni Ŝevĉenkon. Sed la mastro ekkomprenis, ke Ŝevĉenko neniam fariĝos bona lakeo. Dezirante aranĝi por si propran ĉambron, li decidis lernigi Ŝevĉenkon pri pentrado.

Ne longe poste Engelhardt translokiĝis al la ĉefurbo de Rusujo Peterburgo (nun Leningrado). Tiam li sendis Ŝevĉenkon lerni ĉe pentristo. Tiamaniere efektiviĝis la revo de Ŝevĉenko fariĝi pentristo.

Sed Ŝevĉenko ne estis plene kontenta, ĉar li sciis, ke li, kiel servutulo, ne povos plene disvolvi kaj profiti sian talenton. Li sciis homojn kun grandaj talentoj, kiuj tamen mizeriĝis pro sia servutuleco.

Sed favora sorto duafoje helpis lin. Vivante en Peterburgo li ŝatis ofte viziti la "Someran Ĝardenon" kaj pentri statuojn troviĝantajn en la parko. Dum simila laboro renkontis lin ukraina pentristo Soŝenko. Ekvidinte laboron de Ŝevĉenko, li tuj malkovris en li grandan talenton en pentrado. Soŝenko interesigis pri li tiaman grandan rusan pentriston Brjulov kaj rusan poeton Ĵukovski. Ili decidis liberigi Ŝevĉenkon de servuto. La mastro Engelhardt ne konsentis liberigi lin senpage kaj postulis por lia liberigo teruran, en tiu tempo, prezon de 2,500 rubloj.

Por akiri tiun sumon Brjulov pentris portreton de Ĵukovski kaj tiun portreton ili vendis per loterio. La bezonatan sumon ili akiris. Engelhardt ricevis 2,500 rublojn kaj Ŝevĉenko ricevis, je la 22-a de aprilo 1838, liberecon en sia 24-jara aĝo.

Ricevinte liberecon Ŝevĉenko tuj komencis en la sekvanta tago vizitadi la Akademion de Artoj. Li ankaŭ kun granda energio komencis intense pligrandigadi sian klerecon. Krom sia gepatra ukraina lingvo, li sciis jam la polan kaj rusan. Tiam li eklernis ankaŭ la francan. Li legis tre fervore verkojn de plej famaj verkistoj de la mondo. Tial ne mirinde estas, ke la antaŭa servutulo baldaŭ fariĝis unu el la plej kleraj homoj de la mondo.

Sed Ŝevĉenko ne povis ĝui plene sian liberecon. Tion li ne povis, ĉar liaj gefratoj kaj la tuta ukraina popolo daŭre suferis de sklaveco. En lia animo naskiĝadis sentoj kontraŭ la maljusteco.

Liaj kontraŭstaraj sentoj montriĝis unue en lia pentrado. Kontraŭ la tiama kutimo pentri bildojn pri la antikva aŭ biblia historio, li pentris ofte bildojn pri la vivo de la plej malsupraj tavoloj de la popolo.

Sed li baldaŭ ekvidis, ke per pentrado oni ne povas sufiĉe montri proteston kontraŭ tiamaj maljustaĵoj. Tiu protesto baldaŭ komencis montriĝi en liaj

TARAS ŜEVĈENKO:

TESTAMENTO

*Se mi mortos, enterigu
Min en Ukrainlando,
Meze sur la stepo vasta
Ĉe tombmonta rando:*

*Por mi povu vidi-aŭdi
Kamparon larĝegan,
Kaj la Dnepron kun altbordo
La grandan, bruegan!*

*Kiam ĝi el Ukraino
En la maron vastan
Portos for de l' malamikoj
Sangguteton lastan,*

*Tiam ĉion mi forlasos
Kaj flugos al Dio
Por lin preĝi; sed ĝis tiam
Mi ne konas Dion!*

*Enterigu kaj vekigu,
Katenojn disŝiru
Kaj tra sango malamika
Al liber' aliru!*

*Kaj en nova jam libera
Rondo familia,
Ne forgesu min memori
Per vort' simpatia.*

Trad. H. Jakimcuk

poeziaĵoj. En Ŝevĉenko naskiĝis poeto.

Post la 14 jaroj de vivado en Peterburgo, la poeto reiris en Ukrainon. La stato en kiu li ekvidis Ukrainon tre ĉagrenis lin. En daŭro de tiuj 14 jaroj nenio pliboniĝis. En tiu tempo ekaperis liaj tri plej signifaj poeziaĵoj: "Hajdamakoj", "Songo" kaj "Kaŭkazo".

En "Hajdamakoj" li gloris la ukrainan eventon, ke la ukraina popolo faris ribelon kaj en sanga batalo punis siajn tiranistojn. En "Songo" li mokis carojn kaj rusan registaron kaj en "Kaŭkazo" li admiris kaj gloris la malegalan batalon de la kaŭkaza popolo por sin liberigi de la rusa regado.

La versaĵoj supre menciitaj kaj aliaj, kiujn Ŝevĉenko skribis por la defendo de la ukraina kaj aliaj popoloj sklavigitaj de Rusujo, versaĵoj kontraŭ maljustaĵoj de la cara registaro al la kompatindaj malriĉuloj, ne povis plaĉi al la caro kaj lia registaro. Tiuj versaĵoj havis grande-

gan influon al la malriĉuloj kaj la caro ne senbaze ektimis eblan kontraŭregistaran ribelon.

La familio kaj amikoj de Ŝevĉenko avertis lin pri ebleco de aresto al li, kaj tio efektive baldaŭ okazis.

En Kievo ekzistis sekreta societo en la nomo de slavaj apostoloj Cyryl kaj Metodio. La celo de tiu societo estis federi ĉiujn slavajn popolojn en unu ŝtaton sur demokratia bazo. Pro aparteno al tiu societo kaj siaj ribeligaj versaĵoj Ŝevĉenko estis arestita la 5-an de aprilo 1847 kaj punita per deviga soldatservo en azia dezerto.

Oni devas scii, ke en tiamaj tempoj soldatservo en Rusio estis pli severa ol estado en la arestejoj de multaj nuntempaj demokrataj ŝtatoj. Por tio estas plej konvinka pruvo, ke Ŝevĉenko post 10 jaroj de soldatservo revenis kun tute detruita sano. Liberigita de soldatserva devo, pli ĝustadire, liberigita de malliberejo, li vivis nur kvar jarojn (1857-1861). Dum la tur-

menta soldattrejno por Ŝevĉenko estis malpermesite de la caro mem verki kaj pentri.

Kiel Moseo ne ekvidis landon promesitan de Dio, same Ŝevĉenko ne vidis la liberiĝon de siaj gefratoj kaj sia popolo, ĉar la caro kasaciis la servuton nur kelkajn monatojn post lia morto. Por tiu kasacio li batalis dum sia tuta vivo kaj por tiu ideo tiel multe suferis.

Mi dubas ĉu iu ajn alia verkisto en la mondo havis tiel grandan signifon al sia popolo kiel Ŝevĉenko al la ukraina popolo. Per liaj verkoj edukiĝis kelkaj ukrainaj generacioj. Post la revolucio en Rusujo en la jaro 1917 la ukraina popolo plenumis lian testamenton: "Enterigu kaj vekigu, katenojn disŝiru."

Kiel estis menciite, Ŝevĉenko estis ne nur poeto, sed ankaŭ granda talenta pentristo. En kieva muzeo jam en la jaro 1961 troviĝis 800 el liaj pentraĵoj kaj ĉiujare tiu nombro pligrandiĝas.



La Naskipova Maskla Hipokampo

Vi eble trovas absurda la titolon, ĉu la maskla animalo povas naski. Tamen en la kalejdoskopa naturo vere ekzistas naskipova maskla besto. La hipokampo ja estas tia ekzemplo.

Kiel speciala fiŝo la hipokampo vivas en maro, kie abunde kreskas

algoj. Ĝia senskvama plata korpo estas longa je 20-30 centimetroj. Ĝia kapo iom similas al tiu de ĉevalo, tial oni nomas ĝin ankoraŭ mar-ĉevalo. Ĝia ventro elstaras. Ĝi havas naĝilojn brustajn, dorsan kaj koksan, kaj mallongan voston sin svingantan lerte, kiun ĝi alkroĉas al algoj dum sia ripozo. Ĝia dorsa naĝilo similas al ventumilo, per kies ofta svingado ĝi tenas sian ekvilibron. Ĝi estas trovebla ĉie en la ĉinaj maroj apudbordaj. Ĝia ĉefa nutraĵo estas malgrandaj krustuloj. Nun oni jam komencis ĝin bredi.

La hipokampo havas ne nur groteskan aspekton sed ankaŭ apartan naskometodon. Kiam venas tempo por pariĝo, la ventromuroj de la



maskla hipokampo faldas sin al la centra linio de la korpo, iom post iom formante larĝan "poŝon". En tiu tempo la femala hipokampo demetas en la "poŝon" siajn kelkcent ĝis mil ovojn. En la sama tempo la "poŝo" elkreskigas araneaĵojn da angioj, kiuj kuniĝas kun tiuj de la embrioj kaj donas la bezonatan nutron. Post 20 tagoj maturiĝas la idoj. La maskla hipokampo komencas akuŝi kaj eligas siajn idojn el la "poŝo", ke ili komencu sian vivon en maro.

En la senlima maro ĉiuj fortaj bestoj konstante englutas la malfortajn por sia ekzisto. Sed la lastaj ne rezignacias pri tio. Ili ofte faras

(Daŭrigata sur p. 46)

Ĉina Spira Gimnastiko

Beijing-a spira gimnasto Hou Shuying, 50-jara, komencis sin ekzerci en spira gimnastiko en la aĝo de 7 jaroj. Li povas movi sian vitalan energion en kapon, manojn kaj piedojn kaj tiam li povas rompi ferajn stangeton kaj stangon kun longeco de 1 metro kaj diametroj de 2 kaj 5 centimetroj, kaj ŝtonpecon kun longeco de 90 centimetroj, larĝeco de 45 centimetroj kaj dikeco de 10 centimetroj, respektive per mano, piedo kaj kapo. Jen li rompas ferstangeton per mano.




Guangdong-a spira gimnastino Tan Dianyi kuŝas sur argilaj potoj, kaj sur ŝia ventro metiĝas ŝtono peza je pli ol 50 kilogramoj. Alia batas ĝin per granda martelo. La ŝtono rompiĝas, sed Tan kaj la argilaj potoj restas sendifektaj.

La 50-jara Liu Haiting de Beijing komencis sin ekzerci en spira gimnastiko en sia aĝo de 14 jaroj. Per spira forto li povas volvi ŝtalan vergon ĉirkaŭ sian kolon kaj poste malvolvi ĝin per unu forta tiro.



Zhao Jishu havas 46 jarojn. Koncentrinte spiran energion sur la ventron, li povas turniĝi sur la abdomeno sur akra forkpinto.

La 56-jara Qin Jinghai estas spira gimnasto de Shaanxi. Kiam oni metas sur lian ventron ŝtonan premilon je 473 kilogramoj pezan kaj starigas kvar plenkreskajn virojn sur ĝi, li restas sendifekta.





Farado de pupoj



Tricikloj





LA TRIA JUPITERA SATELITO TROVITA DE ANTIKVA ĈINA ASTRONOMO

Ĝenerale oni opinias, ke la kvar ĉefaj satelitoj de Jupitero estis unuafoje trovitaj de Mayer kaj Galilejo en la fino de 1609 kaj la komenco de 1610 respektive. Tiel asertis ankaŭ diverslandaj eldonajoj tiuflankaj.

Antaŭ nelonge Xi Zezong, vicesploristo de la Natursciencia Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, esploris helpe de moderna planeda almanaka tabelo la notojn de la ĉina klasika astronomia literaturo kaj konkludis, ke la tria jupitera satelito estis unuafoje trovita, en la somero de la jaro 364 a.K., de fama astronomo Gan De de la periodo de Militantaj Regnoj (475-221 a.K.) de Ĉinio, t.e. je 1,973 jaroj pli frue ol la jaro en kiu Mayer kaj Galilejo ĝin trovis.

ĈINIO PREMIIS PLEJ BONAJN NOVELOJN DE 1980

La kunveno por elekti kaj premii plej bonajn ĉinajn novelojn de 1980 okazis en Beijing (Pekino), la 24-an de marto ĉi-jare.

La redakcio de "Popola Literaturo", la iniciatinto, ricevis pli ol 400,000 balotilojn de diverslokaj legantoj de la lando. Post rekomendo de legantoj kaj juĝo de specialistoj, 30 noveloj estis elektitaj por premio. Tiuj verkoj akiris certegradan sukceson en la ideologia profundeco, vasteco de la temoj kaj priskribo de personoj; rimarkinde pliiĝis la temoj pri la industria kaj agrikultura produktado kaj vivo de soldatoj. La modlitaj novaj figuroj en la nova periodo altiras kaj kuraĝigas la legantojn. Nemalmultaj el tiuj verkoj atingis novan nivelon en arta traktado.

Inter la 30 plej bonaj noveloj troviĝas "Anekdotoj sur la Okcidenta Fronto" de Xu Huaizhong, "En Nia Vilaĝo" de He Shiguang, "Eklipso de la Luno" de Li Guowen, "30 Milionoj da Juanoj" de Ke Yunlu kaj "Stultulo Wang Laoda" de Jin Yun kaj Wang Yi.

ĈINAJ GEKNABOJ EN INTERNACIA LETERSKRIBA KONKURSO

Je la 18-a de marto la Gazeto "Ĉinaj Geknaboj" aperigis anoncon peti artikolojn de ĉinaj geknaboj por partoprenigi ilin en la ĉi-jara leterskriba konkurso iniciatita de la Universala Poŝta Unio.

La anonco diris, ke la konkurso celas kulturi leterskriban kutimon de la geknaboj kaj intimigi ilian amikecon kun alilandaj geknaboj. La titolo por la kontribuotaj artikoloj estas "Unutaga Vivo de Poŝt oficisto".

La ĉina juĝkomisiono elektos kaj premios la plej bonajn verkojn el la alsendotaj artikoloj de geknaboj de sia lando kaj elektos la plej bonan el ili por ĝin sendi al la Universala Poŝta Unio, ke ĝi transdonu ĝin al la juĝgrupo de Unesko.

ĈINLINGVAJ KURSOJ POR FREMDLANDANOJ

De 1978 Ĉinio ekfunkciigis en 12 altaj lernejoj en Beijing (Pekino) kaj aliaj urboj ĉinlingvajn kursojn kun pli ol 880 lernantoj el 16 landoj. Ĉi-jare Ĉinio funkciigos en pli ol 30 altaj lernejoj ĉinlingvajn kursojn kun pli ol 1,600 lernantoj el Usono, Japanio, FR Germanio, Francio, Britio, Kanado, Nederlando, Finnlando, Italio, Aŭstralio, Aŭstrio, Hispanio, Belgio, Svisio, Svedio kaj aliaj landoj. Plejparto el ili estas ĉinlingvaj instruistoj kaj junaj studentoj de alt- kaj mez-lernejoj, la aliaj estas komizoj, oficistoj, laboristoj, specialistoj kaj profesoroj. La kursoj daŭros 2-8 semajnojn. La kursanoj ricevos ateston pri lernado kiam ili finos sian studadon.

DINOSAŬRA FOSILIARO TROVITA EN SICHUAN-PROVINCO

La Instituto pri Pravertebruloj, la Paleoantropologia Instituto kaj aliaj institutoj sub la Ĉina Akademio de Sciencoj trovis, en Dashanpu la antaŭurbo de la sal-urbo Zigong, Sichuan (Siĉuan)-provinco, mezjurasan dinosaŭran fosiliaron grandan kaj malofte viditan en la dinosaŭro-prifosa historio.

Inter la elterigitaj fosilioj troviĝas raraj kvar kranioj kaj ok kompletaj kaj nekompletaj skeletoj de stegosaŭroj kaj saŭroj, kaj ankaŭ fosilioj de testudoj kaj plesiosaŭroj. Specialistoj opinias, ke la eltrovo ŝtopis la breĉon de la historio de dinosaŭra evoluo kaj liveris gravan materialon por studi la evoluadon de la ĉinaj dinosaŭroj kaj aliaj rampuloj, pri la loko de dinosaŭraj fosilioj kaj por determini la geologian epokon de la mezozoika stratumo de Sichuan-provinco.

NATURPARKOJ DE XISHUANG- BANNA PLIGRANDIGITAJ

Xishuangbanna en la suda parto de Yunnan (Junnan)-provinco estas unu el la malmultaj tropikaj regionoj de Ĉinio. Ĝiaj ekologiaj sistemoj de arbaroj kaj animaloj estas tre variaj. Oni taksas, ke tie kreskas 4,000-5,000 specioj de superaj vegetaloj, t.e. sepono de tiuj de la tuta lando. Inter ili la raraj arbospecioj konsistigas kvaronon de tiuj de la lando, kaj troviĝas preskaŭ mil plantospecioj kun ekonomia valoro. En la vastaj primitivaj arbaroj vivas pli ol 500 specioj de teraj vertebruloj, inter kiuj la birdoj konsistigas trionon de tiuj de la lando kaj la bestoj—kvaronon de tiuj de la lando. Tie la raraj bestoj konsistigas kvaronon de tiuj de la lando.

En 1958 oni starigis tie kvar naturparkojn kun totala areo de pli ol 57,000 hektaroj. Nun ilia areo kreskis ĝis 200,000 hektaroj, al ili aldoniĝis iuj novaj valoraj primitivaj arbaroj.

Spira Gimnastiko kaj Ĝia Saniga Efiko

de ZHANG MINGWU kaj
FAN YUNJIANG*

FRU MATENE, sub pinoj kaj cipresoj en la korto de la Beijing (Pekin)-a Kultura Palaco de Laboruloj, ĉie videblas homgrupoj. Iuj el ili staras senmove kiel kolono, aliaj gracie movas siajn brakojn kvazaŭ dancantaj grupoj. Ili sin ekzercas en la spira gimnastiko helpe de gvidantoj de kurso de spira gimnastiko. En Beijing troviĝas pli ol 30 similaj kursoj fonditaj en parkoj, fabrikoj kaj institutoj. Ĉi matene miloj kaj dekmiloj da homoj faras tian gimnastikon, inter kiuj plejmulto estas mezaĝuloj kaj maljunuloj, kaj ankaŭ japanoj, francoj, argentinanoj kaj ĉinaj elmigrintoj vojaĝantaj en la Patrio.

Spira gimnastiko estas perlo en la ĉina kultura heredaĵo kaj

konsistiga parto de la ĉina medicino. Jam antaŭ kelkmil jaroj la ĉinoj komencis kuraci malsanulojn per tia gimnastiko. En la lastaj jaroj la klinikaj observoj de kelkmil kazoj pruvis, ke ĝi havas efikecon por kuraci altan sangpremon, neŭrastenion, kardiopation, heptan, lienan kaj stomakan malsanojn kaj kanceron.

Mi intervjuis du pacientojn. Unu el ili estas 50-jara laboristo Hou Yunxiu. Ekde 1964 li suferadis de alta sangpremo kaj reŭmatisma kormalsano. La medikamentoj kinidino, digoksino (*digoxin*) kaj nitroglicerino efikis al li nur kiel paliativoj, sed ne povis forigi la malsanojn. Troviĝinte preskaŭ en senelirejo, li eklernis la spiran gimnas-

tikon somere de 1977. Post unu-monata ekzercado li sentis sin iom forta kaj refreŝigita. Post plia ekzercado li aspektis pli sana kaj pli energia. En la fino de la sama jaro li ĉesis preni medikamentojn. Lia sangpremo falis de 195/120mm al 140/90mm, la funkciado de la koro renormaliĝis, kaj malaperis ankaŭ la doloro de stomako kaj artikoj.

Kamaradino Sun, alia paciento, kiun mi intervjuis, estas 39-jara oficistino. En decembro de 1976 kuracistoj konstatis ke ŝi suferis mamglandan kanceron. Kiam ŝi unuafoje estis operaciita, estis jam malkovrita metastazo de du limfaj tuberkuloj ĉe unu akselo. Kaj unu jaron poste la limfaj tuberkuloj translokiĝis al la alia akselo. En aprilo de 1978 oni faris al ŝi duafojan operacion kaj post tri monatoj estis malkovritaj du tumoroj ĉe ŝia dekstra torako. Pro ŝia debileco kaj troa malmulteco de leŭkocitoj ŝi ne povis plu esti operaciita. Ŝi do komencis fari spiran gimnastikon. Dank' al la serioza ekzercado ŝi rikoltis bonajn efikojn post nur du monatoj: Ŝi vigliĝis kaj ekhavis dolĉan dormon kaj bonan apetiton. Post unu-jara ekzercado la leŭkocitoj en ŝia sango pliiĝis de 2500-3000 al 5400, la sang-plateto pliiĝis de 110,000 al 160,000 kaj la hemokromo pliiĝis de 8-9 g. al 11.2 g. Koncerne la tumorojn ĉe la torako, unu el ili reduktiĝis

Ili sin ekzercas per spira gimnastiko frumatene.



al 0.5 cm. kaj la alia tute malaperis. Malaperis ankaŭ plura ŝveliĝo de limfa nodo sur la parotida glando. La pacientino ĝoje diris: “Estas tre saniga la spira gimnastiko. Ĝi forigis la malsanon senhelpe de medikamentoj.”

La spira gimnastiko estas saniga metodo kreita de la ĉina popolo en longtempa praktiko. En la antikveco “sidi senmove kun fermitaj okuloj” estis prenita de la budhismo kaj taoismo kiel metodo por ekzerci la korpon kaj estas nun praktikata de spiraj gimnastoj. La spira gimnastiko de Ĉinio havas multajn skolojn, kiuj ĉefe dividiĝas en du specojn: senmova ekzercado kaj mova ekzercado.

Senmova ekzercado inkluzivas sidan, staran kaj kuŝan pozojn, laŭ kiuj oni ekzercas sin sen movo de siaj membroj. Tamen ili diferencas de la ordinara ripozo kaj sidado. Ĝi celas “senmovigi la ekzercanton ekstere sed movi lin interne” pere de difinitaj ekzercaj pozoj, spirado kaj koncentrado de la atento por ke la homa organismo moviĝu en aparta silento de vekigo. La tiel nomata koncentrado de la atento signifas koncentri la spiriton de la ekzercanto sur iun parton de lia korpo aŭ sur iun apartan objekton ekstere. Tiamaniere oni povas turni la homan organismon ĉefe konsumantan energion en tiun ĉefe akumulantan energion.

Mova ekzercado signifas ekzerci la korpon per movo de la membroj de la ekzercanto. Ĝi tamen diferencas de la ordinaraĵoj sportoj. Ĝi povas kvietigi la animon per iuj ekzercaj pozoj, spirado kaj koncentrado de la

atento. Ĝi inkluzivas ĉefe staran kaj iran manierojn.

Ĉu la senmova aŭ la mova ekzercado, ambaŭ povas kombini la homan spiriton, korpon kaj spiradon. Kompreneble, ne la spira gimnastiko sola povas havigi al la homa spirito povon regi la korpon. Tiun celon povas atingi ankaŭ alia metodo. Prenu kiel ekzemplon la manojn de pianisto. Dank’ al longtempa kaj peniga ekzercado, eĉ en frosta tago liaj fingroj povas varmiĝi, se li tenas la manojn senmovaj en kelke da minutoj antaŭ la ludado. Tio estas tre simila al la regkapablo de la spira gimnasto super la korpo. Tamen la efiko de la spira gimnastiko evidentiĝas pli rekte kaj pli rapide.

La spira gimnastiko estas ankaŭ bona metodo por hardi la homan karakteron. Ĉar la ekzercanto devas konscie forigi ĉian ajn influon al la humoroj; ĉiam teni sin ĝoja kaj trankvila kaj komplete liberiĝi de kolero kaj malĝojo.


En la lastaj jaroj la spira gimnastiko estas akceptita de ĉiam pli multaj homoj kaj rapide disvolviĝis en grandaj kaj mezgrandaj urboj. Iuj provincoj kaj municipoj sistemigis diversajn spirajn gimnastikojn laŭ la lokaj cirkonstancoj. Shanghai (Ŝanhajo), la plej granda urbo de Ĉinio, jam kreis gimnastikon “Dek Ok Ekzercoj” por kuraci la dolorojn de kruro kaj lumbo. Sichuan (Siĉuan)-provinco kreis gimnastikon “Ludoj de Kvin Bestoj”. Ĉio ĉi estas bonvena al la popolamaso.

* Zhang Mingwu estas vicprezidanto de la Beijing-a Studrondo de la Spira Gimnastiko kaj Fan Yunjiang ĝia vicĉefsekretario.



Hou Yunxiu faras spiran gimnastikon.

Majstrino Wang Yufang



KUNPREZENTADO DE LA BRITA KAJ ĈINA ARTOSKETAJ TEAMOJ

La Britaj Artosketa kaj Glacidanca Teamoj kaj la Ĉina Artosketa Teamo faris kunan prezentadon en Beijing en la tria tagdeko de marto, kaj estis varme akceptataj de la rigardantoj.

La britaj teamoj kun Joan Wallis kiel sia estro konsistis el dek gеспortistoj kun meznombra aĝo de 17 jaroj.

La gеспortistoj de ambaŭ landoj faris respektive unuopan artosketadon, paran artosketadon kaj glacidancadon. La prezentado de la gastoj karakteriziĝanta per siaj facilmo, gajeco, flueco kaj forta ritmo montris apartan stilon de la brita glacia sporto kaj donis impreson de juneco kaj vigeleco.

LA ĈINAJ VIRA KAJ VIRINA FLUGPILKAJ TEAMOJ GAJNIS LA RAJTON PARTOPRENI EN LA MONDPOKALA FINALO

La Ĉinaj Vira kaj Virina Flugpilka Teamoj gajnis respektive la unuan lokon de la azia preparkonkurso de la mondpokala turniro kaj pro tio havigis al si la rajton partopreni en la Mondpokala Flugpilka Turniro, kiu okazos en Tokio en novembro ĉijare.

En la finalo okazinta la 20-an de marto en Hongkong, la Ĉina Vira Flugpilka Teamo venkis la Sudkorean Flugpilkan Teamon, unu el la fortaj teamoj de la mondo, per 3:2. Ĝi gajnis venkon en ĉiuj ses matĉoj.

La ĉina virina teamo venkis la Hongkong-an virinan teamon, la lastan rivalon, per 3:0, kaj gajnis la unuan lokon vekinte en ĉiuj tri matĉoj.

Britaj artosketistoj



Lang Ping, Sun Jinfang kaj Zhou Xiaolan de la Ĉina Virina Flugpilka Teamo, kaj Wang Jiawei de la Ĉina Vira Flugpilka Teamo, estis elektitaj kiel plej elstaraj sportistoj de la preparkonkurso.

ĈINA GIMNASTO EN LA GIMNASTIKA ĈAMPIONECA TURNIRO DE LA AMERIKA POKALO

En la individua konkurso kun 6 disciplinoj la ĉina gimnasto Li Yuejiu gajnis tri ĉampionecojn de libera gimnastiko, rekado kaj ĉevalado kaj du subĉampionecojn de duringado kaj paralelado en la Gimnastika Ĉampioneca Turniro de la Amerika Pokalo okazinta en Fort Worth, en la vespero de la 20-a de marto.

Krom gimnastoj el Usono kaj Ĉinio, partoprenis en la turniro


ankaŭ gimnastoj el Kanado, Japanio, Hungario, Rumanio, FR Germanio, Svislando, Francio, Bulgario, Brazilo, Meksikio, Norvegio kaj Italio.

LA MONDA GLACIHOKEA ĈAMPIONECA TURNIRO POR GRUPO C EN BEIJING


La 1981-a Monda Glacihokea Ĉampioneca Turniro por Grupo C okazis en Beijing (Pekino) de la 7-a ĝis la 16-a de marto. La aŭstria teamo gajnis la ĉampionecon, la ĉina teamo la subĉampionecon kaj la hungara teamo la trian lokon. La brita teamo estis premiita pro sia bona stilo en la konkurso. La aŭstria kaj ĉina teamoj partoprenis en la konkurso de Grupo B en la venonta jaro.

La gajnintoj de la kvara ĝis la oka loko estas la danlanda, franca, bulgara, korea kaj brita teamoj.

Ĉinaj sportistoj en hokeo-konkurso



Mia Vivo en la Templo Zhebong



Tudeng Quzha faras budhismajn servojn. Jen li lumigas lampon.

Kiel vivas la tibetaj lamaoj? Pri tio interesiĝas multaj el niaj legantoj. Laŭ la peto de nia redakcio Nanjie, ĵurnalisto de la Novaj-agentejo Xinhua, intervjuis Tudeng Quzha, lamao de la fama templo Zhebong, kiu distancas de la tibeta ĉefurbo Lhasa je 10 km. Li kun razita kapo aĝas 74 jarojn, portas purpuran stolon el lantolo kaj kviete pasigas siajn lastajn jarojn en la maljunulejo de la templo. Nun ni publikigas lian parolon por iom kontentigi la legantojn.

— La Red.

Mi travivis 60 jarojn en la templo Zhebong kiel lamao kaj ricevis bikŝuan disciplinon kun 253 reguloj.

Kiam mi estis 14-jara, miaj gepatroj forpasis unu post la alia kaj mi ne povis min vivteni. Mi kun miaj kvin samaĝaj amiketoj forlasis la hejmlokon Kangding de Sichuan kaj atingis Lhasa post kvar-monata piedirado kaj almozpetado sur la vojo.

Mi fariĝis lamao de la templo Zhebong. De tiam mi ne zorgis plu mian vivrimedon, ĉar tiam la lamaoj devis esti vivtenataj de ordinaraj popolanoj. En la templo Zhebong pli ol 20,000 servutuloj okupiĝis pri pezaj laboroj por vivteni 7,700 lamaojn. La lamaoj faris nenian produktan laboron, ilia tasko estis reciti sutron kaj fari budhismajn servojn.

Fariĝi vera lamao ne estas tiel facile. Oni devas deteni sin absolute de mortigo, volupto, avareco kaj mensogo. Tio estas religiaj disciplinoj difinitaj de Zongkaba, la fondinto de la flava sekto de lamaismo, en la meza periodo de la 15-a jarcento. La flava sekto oponis kontraŭ mon- kaj rang-avido, edziĝo kaj diboĉa vivo, kiujn ĉasis la bonzoj de la nigra, ruĝa, bunta kaj blanka sektoj. Mi apartenas al la flava sekto prosperanta en la nuna periodo.

Granda ŝanĝiĝo nun okazis al nia vivo. La ordinaraj lamaoj ĉasis esti parazitaj kaj vivtenas sin de sia laboro. La templo Zhebong nun havas 260 lamaojn, el kiuj 184 estas lamaoj persistantaj en asketismo. Eĉepte de 65 lamaoj maljunaj, malsanaj kaj kriplaj, kiuj vivas de la ŝtata

subvencio, la aliaj lamaoj okupiĝas pri religia kaj produkta aktivadoj sub la gvido de la demokratia administra komisiono konsistanta el 9 membroj elektitaj de la lamaoj. Krom budhismaj servoj ĉiutage, kiaj sutrorecitado, oferfarado, ili ankaŭ kulturis ĉ. 10 hektarojn da kampoj, flegas pli ol 10,000 persik-, pir- kaj pom-arbojn kaj bredas ĉ. 120 gruntbodyojn kaj ĉevalojn kaj 700 ŝafojn. Per tiuj laboroj ili havigas al si grenon, buteron, bovaĵon kaj ŝafajn (la tibetaj lamaoj estas permesitaj manĝi bovaĵon kaj ŝafajn) kaj kontantan monon.

Lastjare mi ricevis 400 juanojn, pli ol 150 kilogramojn da zanbao (ĉefmanĝaĵo de tibetanoj farita en nud-hordea faruno kaj butero), 6 kg. da butero kaj bovaĵon kaj ŝafajn. Ĉijare

anstataŭ partopreni en la produktita laboro, mi komencis vivi en la maljunulejo de la templo, sed la registaro kaj la komisiono donis al mi la supre menciitajn nutraĵojn kiel antaŭe kaj 8 juanojn kiel poŝmonon.

La 8-a, 10-a, 15-a kaj 30-a de ĉiu monato laŭ la tibeta kalendaro estas feliĉaj religiaj tagoj por la lamaoj. En tiuj tagoj la lamaoj devas kune reciti sutron kaj pilgrimantoj el diversaj lokoj donacas al ni sufiĉe grandan sumon da mono kaj manĝaĵoj. Iam ĉiu lamao povas ricevi unutage eĉ pli ol 20 juanojn kaj diversajn manĝaĵojn. Tion la pilgrimantoj faras kun la deziro ke ni preĝu pri riĉrikolto en agrikulturo kaj brutbredado kaj pri stabila vivo.

Mi loĝas en tibetstila etaĝdomo kun tri ĉambroj, kaj sur mia balkono metiĝas florvazoj. Je la tagiĝo mi ellitiĝas kaj recitas sutron unu horon fronte al la statuoj de Ŝakjamunio kaj Zongkaba sur mia ŝranko, poste mi ricevas de la kolektiva kuirrejo termobotelon da butera teo kaj frititajn farunaĵojn por matenmanĝo. La tagmanĝaĵo estas zanbao aŭ farunaĵo, bovaĵo aŭ ŝafaĵo. La vespermanĝaĵo estas vermiĉeloj aŭ zanbao kaj kaĉo kun rafano, bovaĵo kaj ŝafaĵo. En la kuna recitado de sutro antaŭtagmeze aŭ posttagmeze, la templa administra komisiono aŭ koncerna almozdonanto certe regalas la lamaojn per manĝo aŭ butera teo. Post vespermanĝo mi kutime promenas en la fruk-


toĝardeno de la templo, iatempe mi rigardas filmon aŭ ludas kartojn kune kun aliaj lamaoj. Kiam mi estas bonfarta, mi recitas sutron antaŭ la enlitiĝo.

Antaŭ la tibeta Novjara Tago (la 5-a de feb. ĉijare), mia nevino skribis al mi, ke mi hejmenrevenu por pasigi la feston kune kun ili. Sed pro la tro longa vojaĝo kaj mia granda aĝo mi ne povis reveni. Mia antaŭa disĉiplo Yixiliexie, kiu estas sekulariĝinta lamao kaj nun laboras en la Lhasa-a Cementa Fabriko, kaj lia filino Mima ofte min vizitas.

Ekde la jaro 1959, en la demokratia reformo por aboli la tibetan servutulan sistemon volonte sekulariĝis granda nombro da lamaoj. Multaj homoj antaŭe fariĝis lamaoj por trovi vivrimedon aŭ fuĝi de persekutado fare de iliaj mastrosinjoroj. El la sekulariĝintaj lamaoj nemalmultaj fariĝis laboristoj de nove starigitaj fabrikoj kaj iuj poste eĉ fariĝis kadroj. Tio estas la kaŭzo, kial la lamaoj de Zhebong-templo draste malpliĝis post la demokratia reformo. Ĉ. mil lamaoj en la tuta Tibeto volonte restas, same kiel mi, en templo por travivi siajn lastajn jarojn.

Krom fari religiajn aferojn, ni ankaŭ devas plenumi alian taskon administri kaj protekti la historiajn objektojn de la temploj. Zhebong-templo estas la plej granda el la pli ol dek temploj de Tibeto. Ĝi konstruiĝis en la jaro 1416. En ĝi estas arĝentaj pagodoj entenantaj ostojn de la forpasintaj Dalai-lamaoj la Dua kaj Kvara, dek-miloj da oraj, arĝentaj kaj latunaj budhaj statuoj kaj granda nombro da sutroj. Tiuj sutroj estas tre valoraj por studi la tibetan historion.

Pilgrimantaj budhistoj donacas monon al lamaoj recitantaj sutron.



Nuklea Energio—Elekto de la Mondo

Rilate al la disvolvo de nuklea energio, iuj aprobas tion, aliaj kontraŭstaras, kaj eĉ en nemalmultaj lokoj oni faras protestan manifestacion. Ĉi-sube ni publikigas artikolon kiel referencan materialon por la legantoj, kiu havas intereson pri tiu ĉi problemo.

— La Red.

Depost kiam la unua nuklelektra stacio de la mondo — la nuklelektra stacio Obninsko de Sovetunio estis finkonstruita en junio 1954, la nuklea energio kiel nova riĉfonto de energio tuj altiris al si atenton de ĉiuj landoj de la mondo, kaj sekve de tio, la ekspluatado kaj utiligo de nuklea energio fariĝis studobjekto plej multe zorgata internacie.

Dum la lastaj jaroj, pro la nesufiĉa liverado de petrolo multaj landoj rapidigis la konstruadon de nuklelektra stacio. La kapacito de nukleaj generatoroj de la mondo en 1979 estis 8.3-oblo de tiu en 1969. Ĝis la fino de 1979, 22 landoj kaj regionoj de la mondo posedis 240 funkciajn nuklelektrajn staciojn kun totala kapacito de 125 milionoj da kilovattoj kaj la elektro produktita de tiuj nuklelektraj stacioj ĉiujare atingis 3,276,449 milionojn da kilovathoroj. Laŭ la raporto de la Internacia Atom-energia Agentejo, en la fino de 1979, ĝi konsistigas 8% de la totala


kvanto de elektro produktita de la mondo. Oni taksas, ke en 1985, la kapacito de la nuklelektraj generatoroj atingos 290 — 350 milionojn da kilovattoj, la elektro produktita de tiuj generatoroj konsistigos 16% de la totala kvanto de elektro produktita en la mondo, kaj en la mezo de la naŭdekaj jaroj ĝi konsistigos 30%. Nun 346 nuklelektraj stacioj kun kapacito de 338 milionoj da kilovattoj estas konstruataj kaj konstruotaj.

Kial multaj landoj metis sian atenton sur konstruadon de nuklelektra stacio? Unue, ĝia produkta kosto estas malalta kaj la transportado kaj rezervado de ĝiaj hejtaĵoj estas facilaj. Eksterlande, kvankam la kosto por konstrui nuklelektran stacion estas 1.5-2-oblo de tiu de samskala termoelektra stacio, tamen nuklea hejtaĵo estas multe malpli kosta ol tiu de termoelektra stacio, kaj krome, nuklelektra stacio ĝenerale povas funkcii 25-30 jarojn kaj malmulte kostas ĝia riparado. Tial la


totala produkta kosto de nuklelektra stacio estas nur du trionoj aŭ duono de tiu de termoelektra stacio. En 1978 la kosto de ĉiu kilovathoro da elektro por petrolelektra stacio de Usono estis 4 cendoj, por karboelektra stacio 2.3 cendoj, sed por nuklelektra stacio 1.5 cendoj. Tiu-jare Usono ŝparis 3 miliardojn da dolaroj dank' al uzo de nuklelektraj stacioj. La rimarkinda karakterizaĵo de la nuklea energio estas alta koncentriĝo de energio. La energio de unu kilogramo da uranio egalas proksimume al tiu de 2,400 tunoj da norma karbo aŭ 2,000 tunoj da petrolo. Karboelektraj stacioj kun kapacito de 100 milionoj da kilovattoj forkonsumas ĉiujare 300-400 milionojn da tunoj da karbo, kies transportado estas tre peza ŝarĝo. Kaj krome ĝi ĉiutage produktas dek milojn da tunoj da skorio kaj cindro. Sed nuklelektraj stacioj kun la sama kapacito bezonas nur 3,000-4,000 tunojn da malalta kondensita uranio. Ilia transportado, inkluzive la eluzitan uranion,

bezonas malpli ol 1,000 specialajn ŝarĝaŭtojn ĉiujare.

Due, la nuklea energio estas sekura kaj pura. De post kiam ekfunkciis la unua nukleelektra stacio, jam akumuligis 1,400 reaktorojaroj (unu reaktorojaro estas daŭro de unu-jara funkciado de reaktoro), sed neniam okazis ellaso de granda kvanto da radioaktivaj elementoj, nek okulfrapa radioaktiva difektiĝo al la loĝantoj aŭ laborantoj. La unu-jara radioaktiva influo de nukleelektra stacio en norma funkciado al la ĉirkaŭaj loĝantoj estas malpli forta ol tiu de unufoja X-radia ekzameno. La akcidento de la nukleelektra stacio sur la Tri-mejla Insulo de Usono okazinta en marto de 1979 estis la plej serioza en la historio de la nukleenergia utiligo de la mondo. Tamen, laŭ la mezuraj donitaĵoj publikigitaj de la Nuklea Administra Komisiono de Usono, la radioaktivaj elementoj ellasitaj en la akcidento estis tre malmultaj. Laŭ la kalkulo de la Usona Mediprotekta Buroo, se iu restus tiam ĉe la plej proksima radioaktiva cirklo ĉirkaŭ la nukleelektra stacio, la radioaktiva kvanto trafita sur li estus egala al tiu de tri-foja X-radia ekzameno. La medicina rondo opiniis sensencaj la informojn, publikigitajn en ĵurnaloj de Usono, pri plialtiĝo de la mortoproporcio de embrioj kaj la nombro de suferantoj de strumito kaŭze de la akcidento. Kontraste kun tio, la polucio de termoelektra stacio estas serioza. Unu karboelektra stacio kun kapacito de miliono da kilovatoj ĉiujare ellasas 164,000 tunojn da venena gaso; se oni prenas pezoleon kiel brulaĵon, ĉiujare ĝi ellasas 121,400 tunojn da venena gaso. Tio serioze minacas



Nuklea elektrejo B de Hunterston konstruita en 1976, kun du avangardaj aeromalvarmigaj reaktoroj. Ĝia elektra povo estas 1320 mil kv.



La kontrolo centralo de la nuklea elektrejo

la sanon de la loĝantoj. Kaj krome la polucio de radioaktivaj elementoj, kiel uranio, torio kaj radiumo, entenataj en karboskorioj, estas multe pli serioza ol tiuj de normale funkciantaj nukleelektraj stacioj. En 1979 vicprezidanto de la Nuklea Sekuriga Komisiono de Sovetunio en sia artikolo "La Nuklea Energio kaj la Medio" diris, ke la nombro de mortintoj pro kancero ĉirkaŭ termoelektra stacio estas 30-oble pli granda ol tiu

ĉirkaŭ sampova nukleelektra stacio. La analizo de Usono pri la sekureco de la nukleelektra stacio montris, ke la ebleco de vundo kaj morto kaŭzitaj de akcidentoj de nukleelektra stacio estas multe malpli granda ol tiuj kaŭzitaj de akcidentoj de aviadilo, digbreĉiĝo, incendio, ellaso de kloro kaj eksplodado de kemiaĵo. Sendube, ankoraŭ iuj gravaj teknikaj problemoj en utiligo de la nuklea energio estas solvendaj, ekz. kiel efektive

sekurigi nukleelektran stacion kaj trakti ĝiajn eluzitaĵojn. Nun iuj landoj verŝas ilin en marojn kaj per tio malpurigas ilin, kio vekis ĉiam pli grandan maltran- kvilon de la publiko.

Utiligo de nuklea energio havas aliajn avantaĝojn. La disvolvado de la nuklea energio povas ŝparigi petrolon kaj karbon, kiuj estas materialoj por fabriki sintezan fibron, kemian sterkon, plaston, tinkturon, artefaritan kaŭĉukon, medikamenton, insekticidon, sintezan purigilon, ktp. La varmon de nukle- elektraĵoj oni povas uzi por sensaligi marakvon, forĝi ŝtalon kaj gasigi karbon, aŭ ser- vigi al diversaj fabrikoj kaj loĝantaraj instalaĵoj.

La altrapida disvolvo de nuk- leelektra stacio rezultas el la nuna situacio de energio de la mondo. Nuntempe karbo kaj petrolo estas ĉefaj riĉfontoj de movfortoj. Tamen la industrio kaj trafiko en rapida disvolviĝo konsumas grandan kvanton da energio. La organikaj brulaĵoj forkonsumitaj en la tuta mondo en 1976 egalas al 7,500 milionoj

da tunoj da norma karbo. La Monda Energia Konferenco antaŭkalkulis en 1977, ke en la jaro 2000 la forkonsumita ener- gio atingos 23,500 milionojn da tunoj da norma karbo. La petrola riĉfonto konita nun en la mondo egalas al 115,000 milio- noj da tunoj da norma karbo kaj la riĉfonto de natura gaso al 60,000 milionoj da tunoj da tio. El tio oni povas vidi, ke la ener- gio de organikaj brulaĵoj estas limigita, kaj post centoj da jaroj aperos danĝero de manko de tia energio. Eĉ en la venontaj 50 jaroj ĉiam pli serioziĝos la mal- sufiĉeco de karbo kaj petrolo en la provizado.

La urania brulaĵo estas tre riĉa. Se oni plene utiligos ura- nion en la maro, oni akiros energion egalan al 1,400 miliar- doj da tunoj da norma karbo. Se la tuta mondo ĉiujare for- konsumos 25,000 milionojn da tunoj da norma karbo, do la urania brulaĵo sufiĉos por uzo de 560 miloj da jaroj. Tial utili- go de la nuklea energio estas efika vojo por solvi la proble- mon pri malsufiĉo de energio.

Ĉar la nuklea energio havas multajn avantaĝojn, nemalmul- taj landoj aktive disvolvas ĝin. Pro manko de natura riĉfonto Francio kaj FR Germanio pla- nas praktiki la politikon utiligi nuklean energion en la okdekaj jaroj. En Francio oni ĝenerale konstruas nukleelektraĵojn kaj konstruas termoelektraĵojn nur en eksterordinaraj cirkonstancoj. Ĝi planas, ke en 1985 la elektro produktita de la nukleelektraĵoj konsistigos 50% de la bezonata elektro. Pro la ĉiam pli streĉiĝanta situacio en la Mezoriento kaj la Persa Golfo, pli kaj pli malboniĝos la internacia petrololiverado. Pre- cipe Japanio, kiu ĉiam dependas de importado de petrolo, prenas la nuklean energion kiel gravan konsistigan parton en la struk- turo de la energia riĉfonto. La monsumo asignita de Japanio por atoma afero en 1980 pliiĝis je 40% kompare kun tiu de 1979. Eĉ landoj riĉaj je petrolo kaj hidraŭlikaj riĉfontoj ellaboris planon aktive disvolvi indus- trion de nuklea energio. Kvan- kam Usono havas multan riĉ-
(Daŭrigata sur p. 16)

MATERIALO

Ĝis la fino de 1979, la elektro produktita de la nukleaj elektrejoj de la mondo estis 3,276,449 milio- noj da kilovatthoroj. En tiu ĉi jaro Usono havis 72 nukleelektraĵojn, kiuj produktis 279,718 milio- noj da kilovatthoroj da elektro. Japanio havis 21 nukleelektraĵojn, kiuj produktis 62,003 milio- noj da kilovatthoroj da elektro. Francio havis 16 nukleelektraĵojn

staciojn, kiuj produktis 42,538 milio- nojn da kilovatthoroj da elektro. FR Germanio havis 12 nukleelektraĵojn, kiuj produktis 42,289 milio- nojn da kilovatthoroj da elektro. Kanado havis 10 tiajn staciojn, kiuj produktis 38,478 milio- nojn da kilovatthoroj da elektro. Kaj Britio havis 33 tiajn staciojn, kiuj produktis 38,327 milio- nojn da kilovatthoroj da elektro.



集錦

KALENDOSKOPO

(Daŭrigo de p. 36)

lertajn artifikojn por rezisti kaj fuĝi. Ĉar la femala hipokampo, kiu devas demeti ovojn, estas malforta kaj facile mortigebla aŭ vundebla de aliaj bestoj, tial la forta maskla hipokampo prenas sur sin la taskon naski idojn.

Jam antaŭ longe ĉinoj ekuzis la hipokampon kiel medikamenton por kuraci renan malsanon, impotentcon, traŭmaton, astmon, absceson k.a.

Neĝlotuso—Planto sur Altebenajo

Neĝlotuso kreskas sur la supro de alta montaro, en glaci-rivero kaj neĝa zono, kaj en Ĉinio ĝi troveblas nur sur la Qinghai-Tibeta Altebenajo, Tianshan-montaro kaj aliaj, en loko 4,000-5,600 metrojn super la marnivelo. Ĝi radikas en rokfendoj, inter gruzoj aŭ en eroziaj ŝtonoj. Ĝi povas vivi en ventego kaj neĝego, tre malalta temperaturo, sterila grundo kaj fortaj ultraviolaj radioj.

Pro longtempa kreskado en la malbona altmonta medio la neĝlotuso formis por si tute alian pozon kaj apartan vivmanieron. Ĝiaj longaj radikoj fiksiĝas dise inter

gruzoj por sorbi nutron kaj akvon kaj rezisti kontraŭ ventego. Estas pli ol 30 specoj de neĝlotusoj, sed laŭ aspekto ili povas esti dividitaj en du kategoriojn: Unu kun folioj verdaj kaj iom violaj surhavas lanugojn. Ekstere de la floro sur la mallonga tigo troviĝas kelkaj molaj membraneaj folioj flavaj aŭ violaj, similaj al lotusfloraj petaloj. Pro tio ĝi akiris la nomon neĝlotuso. Tiuj folioj kiel gazo sur la kapo de knabino povas redukti difektadon de ultraviolaj radioj al la neĝlotuso kaj ĝin plibeligi, ke ĝi kiel bunta papilio flirtu en vento. La alia surhavas longajn blankajn lanugojn tutkorpe, kvazaŭ ĝi portus felton. Per la lanugoj ĝi povas rezisti kontraŭ frostoj, konservi varmon kaj reflekti fortajn radiojn.

Jam antaŭ tre longe oni ekuzis la neĝlotuson kiel medikamenton. Tion priskribis tibetana farmakopeo frue en la sepa jarcento. Tiu planto povas kuraci reŭmatismen, reguligi la menstruan funkcion kaj vigligi la sangon cirkuladon, kaj precipe preventi frutempan gravedigon.

Moskocervo kaj Ĝia Mosko

La moskocervo estas milda, timema kaj negrupiĝema. Kiam ĝi vidas homon, ĝi kuradas freneze, ĝis morto je puŝiĝo aŭ laciĝo. Estas tre malfacile kapti ĝin viva.

Mosko estas sekreciata el la moska glando apud la umbiliko de la maskla moskocervo kaj uzata por




Neĝlotuso

fari valorajn parfumojn kaj medikamentojn. En la antikva Ĉinio oni uzis ĝin kiel oferaĵon por forpeli malfeliĉon kaj demonojn. Same kiel aliaj oraj, arĝentaj kaj juvelaj raraĵoj, ĝi estis ĝuata de imperiestroj kaj korteganoj. Efektive, ĝi plej taŭgas por fari diversajn valorajn medikamentojn. Jam en la orienta Han-dinastio (25-220 p.K.) Ĉinio ekuzis ĝin tiurilate. Fama medicinisto de Ming-dinastio Li Shizhen (1518-1593) skribis en sia farmakopeo "Ben Cao Gang Mu": "Mosko povas esti vaste uzata por funkciigi la korpajn organojn, streĉi la interrilatojn inter tiuj organoj, forigi la malsanojn en la muskoloj kaj ostoj kaj kuraci alkoholismen, dispepsion, apopleksion kaj malsanojn de miasmo, fobio kaj mukaĵo."

Estas bedaŭrinde, ke antaŭe oni akiris moskon ĉefe de ĉasitaj moskocervoj. Tiam la moskocervoj, ĉu masklaj kaj femalaj, aŭ junaj kaj maljunaj, estis mortigitaj senescepte, ke difektiĝis la riĉfonto de la sovaĝaj bestoj.

Ekde la 5-a jardeko de la kuranta jarcento stariĝis nombro da bredejoj de moskocervoj en la provincoj Qinghai (Kinghai), Sichuan (Sichuan) kaj Anhui (Anhui) de Ĉinio. Oni sukcesis dresi ilin kaj preni moskon de vivantaj moskocervoj. Sed ĝia malgranda produktokvanto ankoraŭ ne povas kontentigi la bezonon de la merkato.



Maskla Moskocervo

NOVAJ LIBROJ

ĵus eldonitaj de "El Popola Ĉinio"


Skizo pri

ĈINIO

(17-Es-1504 PA)

konigas al la legantoj fundamentajn sciojn pri

**GEOGRAFIO,
HISTORIO, POLITIKO,
EKONOMIO KAJ
KULTURO DE ĈINIO**



kun konciza mapo kaj ilustraĵoj
132 × 186mm. 104 paĝoj broŝurita Prezo: £0.65 US\$1.30

NEZHA KIRLAS LA MARON

(88-Es-173 P)

Kolora infanlibro pri interesa malnova legendo. Loĝantojn tiranis drako-reĝoj, kiuj regis pluvon kaj akvon. Por savi la popolamasojn la mirinda knabeto Nezha batalis kontraŭ la drako-reĝoj kaj fine subigis ilin per magiaj armiloj.

262 × 180mm. 84 paĝoj broŝurita
Prezo: £1.10 US\$2.30

Mendu ĉe peranto de EPĈ
aŭ ĉe Esperanta Sekcio de
GUOJI SHUDIAN,
P.O. Kesto 313, Beijing,
Ĉinio





Muziko

Revekis Nian Amikecon

de DING SHANDE*

KUN nekvietigebla koro mi revizitis Pollandon. Mi denove vidis ĝian amikan popolon kaj ĝian urbon, kiu simbolas neflekseblecon, kaj mi denove dronis en melodio de amikeco inter la ĉina kaj pola popoloj.

Kien ajn ni iris en Varsovio en la lasta septembro sub la ĉielo jen serena jen malserena, ĉiuj poloj, ĉu konataj aŭ nekonataj, ĵetis al ni intimajn rigardojn de tempo al tempo. Estas neforgeseblaj iliaj amikaj ridoj kaj varmaj manpremoj.

Ni venis al tiu lando por partopreni en la Dekaj Ŝopena Internacia Piana Konkurso. La nomo de Ŝopeno kune kun lia sonora, profunda pianado iris tra la mondo. Tiu fama pola muzikisto kreis dum sia tuta vivo pli ol 160 pianajn verkojn, per kiuj li prikantis siajn patrolandon kaj popolon kaj montris sian amon al ili. La originala stilo de liaj verkoj havas gravan lokon en la monda muzika tre-

zorejo. Por memori tiun patriotan muzikiston, la pola popolo periode okazigas la Ŝopenan Internacian Pianan Konkurson. Tia konkurso ludas gravan rolon en la monda muzika kampo, kaj nemalmultaj pianistoj famiĝis pro ricevo de premio en la konkurso.

En la kvina Ŝopena Internacia Piana Konkurso en 1955, ĉina pianisto Fu Cong gajnis la trian lokon kaj ricevis premion de la plej bona ludo de "Mazurko". En la Sesaj Konkurso en 1960, ĉina pianisto Li Mingqiang gajnis la kvaran lokon. Tiufoje mi estis invitita de Pollando aliĝi al juĝ-komisiono por la konkurso kaj vizitis ĝiajn multajn urbojn. La amikaj sentoj de la pola popolo por la ĉina popolo min impresis neforgeseble. Ĉi-foje Ĉinio sendis sep pianistojn al Varsovio por partopreni en la Dekaj Ŝopena Piana Konkurso. Post 20 jaroj mi denove venis al

la Ŝopena konkurso, kaj la pola popolo kiel antaŭe etendis amikajn manojn por varme bonvenigi nin. Prezidanto de la Societo Ŝopeno Viktor Weinbaum ĝoje diris al mi: "Depost 1960 ĉinaj pianistoj ne venis al Pollando, la patrolando de Ŝopeno. Ĉi-foje vi sendis grandan trupon al la Ŝopena konkurso, ni tre ĝojas, ni bonvenigas vin!"

Ĉiufoje, kiam juna ĉina pianisto finludis, varma manklakado leviĝis en la halo. La pola popolo tre amas muzikon kaj havas tre altan nivelon en aprezado. Nemalmultaj aŭskultantoj kun fasko da freŝaj floroj venis al la konkursa halo kaj ĝin prezentis al la pianisto, kiu plaĉas al ili. Je la fino de ĉiu ludo ĉinaj ludistoj ricevis belajn bukedojn. La varma manklakado kaj la belaj bukedoj montris laŭdojn de la pola popolo al la ĉinaj pianistoj kaj ankaŭ ĝiajn profundajn sentojn por la ĉina popolo.



Liu Yifan akceptas premion.

Pola pianistino Hans Boukuvska donacas memori-gajon al Ding Shande kiam ŝi vizitas Shanghai en 1980.



La societo Ŝopeno de Pollando kaj ĝia studenta klubo speciale invitis la ĉinajn pianistojn doni koncerton. Pola disko-kompanio faris du diskojn, kaj unu flanko de unu el ili surdiskigis muzikaĵojn luditajn de ĉinaj pianistoj. Kaj ĝi elĉerpiĝis en la daŭro de nur du tagoj.

Ĉina pianisto Liu Yifan per sia ludo gajnis multajn buketojn de aŭskultantoj. Iu grandaĝa avino kun emocio venis antaŭ tiun 18-jaran ludiston por esprimi sian senton. Je la disigo ŝi demandis nin pri la tempo de nia hejmeveno. En la tago de nia forlaso de Pollando tiu afabla avino venis al la fervoja

Ĉinaj muzikistoj inter polaj infanoj en la Domo de Ŝopeno



stacio, kun du buketoj. Ŝi donacis unu al Liu kaj la alian al lia instruistino Wu Leyi. Ĉu la belaj floroj, amemaj okuloj, amikaj vortoj ne montris la konstantajn verajn sentojn de la pola popolo al la ĉina?

Kvankam maljuniĝis pola pianistino Lidia Grychtofowa, kiu vizitis Ĉinio en 1952, tamen post pli ol 20 jaroj ŝi havas ankoraŭ varman amikecon al la ĉina popolo. Rememorante siajn tagojn pasigitajn en Ĉinio, ŝi diris kun profunda sento: "Mi neniam forgesos la amikan senton de la ĉina popolo por ni!"


Neforgeseblaj por mi estas jenaj vortoj de profesoro Regina Smendzianka: "Ni poloj tre ŝatas vian lud-stilon, ĉar vi,

ĉinoj, same kiel ni komprenas Ŝopenon. Viaj koroj estas proksimaj al tiu de Ŝopeno, t.e. al tiu de nia pola popolo." Jes, la ĉina kaj pola popoloj amas sian patrolandon kaj ĝiajn sendependecon kaj liberecon, kaj ĝuste pro tio nin kunligas la senmortaj muzikaj verkoj komponitaj de Ŝopeno per la tuta energio!

Forpasis 20 jaroj de 1960 ĝis ĉifoja vizito, tamen mi profunde sentis, ke la amikeco inter niaj du popoloj estis tiel forta. La amika sento de la pola popolo por la ĉina popolo jam gravuriĝis profunde en niaj koroj!

** La aŭtoro estas vicprezidanto de la Ĉina Muzikista Asocio.*

Ĉinaj muzikistoj gastas en la domo de pola pianistino Hans Boukuvska.



Per Esperanto por Ĉina- Pollanda Amikeco

“Kun granda ĝojo ni konstatis, ke vi tiel afable reagis je nia esperantlingva alvoko por kontribuoj al renovigo de la krakovaj historiaj monumentoj. Kun multaj dankoj ni akceptas la alsenditajn de vi 10 librojn kaj portretojn de Zamenhof. Ni same alte aprezas vian oferon de 20 abonoj de El Popola Ĉinio por 1981... Pri via agado estos informotaj pola kaj esperantista publikoj.”

La supre cititaj vortoj estas el la letero skribita de Socia Komitato por Renovigo de Krakovaj Historiaj Monumentoj al la redakcio de El Popola Ĉinio.

Krakovo — la iama ĉefurbo de Pollando — ĉiam estis kaj estas unu el la plej gravaj mondaj kulturaj kaj sciencaj centroj. La urbo restis ĝis nun kiel majesta arkitektura monumento. Sed la tempopaso, malbona klimato kaj industria polucio endanĝerigas ĝiajn historiajn postrestaĵojn, kaj ruiniĝo nun minacas al kelkaj miloj da konstruaĵoj tie. Konsekvence ekfunkcias monkollektado por la renovigo de la urbo, kaj ankaŭ Pola Esperanto-Asocio elsendis alvokon por ke la tutmonda esperantistaro faru sian kontribuon tiucele.

Responde al tio ni aperigis la alvokon sub la titolo “Krakovo petas helpon” en la n-ro 12 de nia revuo 1980, kaj aliflanke ni sendis nian propran kontribuon al Pollando subtene al la projekto de renovigo. Estas tre ĝoje konstati, ke Esperanto refoje montras sian utilan rolon en la amikecaj rilatoj inter la popoloj kaj esperantistoj de Ĉinio kaj Pollando.



Paleoantropologo prof. Wu Rukang esploras Rama-pitekan kranion kune kun sciencistoj.



Rama-piteka Kranio Trovia en Ĉinio

de XU QINGHUA kaj PAN YUERONG

JE la 1-a de decembro de 1980, kra nio de Rama-piteko (*Ramapithecus*) estis trovita de esplora taĉmento kune organizita de la Paleovertebrula kaj Paleoantropologia Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj la Yunnan-a Muzeo, estrata de la ĉina paleoantropologo prof. Wu Rukang, en la karbominejo Shihuiba de Lufeng-gubernio de Yunnan-provinco de la sudokcidenta Ĉinio. Tiu grava trovo malfermis novan perspektivon por la esplorado pri la homa deveno.

LA UNUA RAMA-PITEKA KRANIO

La fosilio de Rama-piteko estis unue trovita en 1932 en Hindio, poste en Kenjo, Hungario, Turkio,

Pakistano kaj Ĉinio. Sed la pasintaj trovitaĵoj estas nur supraj, mal-supraj makzeloj kaj dentoj, kaj ilia geologia periodo estas antaŭ 15,000,000-7,000,000 jaroj. La Rama-piteka fosilio montris, ke ĝiaj dentvicoj forme proksimiĝis al tiuj de homo, la kaninoj estas malgrandaj kaj la molaroj relative grandaj kaj la emajlo sur iliaj kontaktiĝaj surfacoj pli dika. Tiuj karakterizaĵoj montris, ke Rama-pitekoj pliproksimiĝis al la fruaj homoj ol la samtempaj pitekantropoj. Tial, nun plejparto de fakuloj opinias, ke Rama-pitekoj estis la plej fruaj kaj rektaj prauloj de homo, aŭ transira tipo de simio al la homo kaj evoluis en Aŭstralo-pitekojn (*Australopithecus*). Oni jam konfirmis,

ke ili estis veraj homoj povantaj iri vertikale. Estis strange, ke escepte de la Rama-piteka fosilio trovita en Kenjo, ĉiuj aliaj trovitaj en aliaj landoj kunekzistis kun Siva-pitekoj (*Sivapithecus*). Kaj iuj karakterizaj de iliaj dentoj similis al tiuj de Aŭstralo-pitekoj. Pro tio iuj fakuloj prezentis diversajn malsamajn opiniojn pri la evoluo de Rama-pitekoj kaj iliaj rilatoj kun Siva-pitekoj. Iuj opiniis, ke Siva-pitekoj probable same kiel Rama-pitekoj evoluis en Aŭstralo-pitekojn. Sed limigite de specimenoj tiuj disputoj ne povis esti solvitaj. Por precize certigi ĉu iuspeca pitekantropo estas la plej frua praulo de la homo, la plej forta kaj rekta pruvo estas ĝia krania fosilio. Ĉar oni povas prijuĝi laŭ ĝia krania formo, ĉu ĝi povis rekte stari sur la du piedoj kaj iri per ili kaj kian gradon atingis ĝia saĝo. La Rama-piteka kranio de Lufeng-gubernio de Ĉinio estas unua trovo en la mondo, kaj pro sia grava rolo en la esplorado pri la homa deveno, ĝi vekis grandan atenton en la internaciaj sciencaj rondoj. La krania fosilio estas tre fragila. Kiam oni trovis ĝin, ĝi jam rompiĝis en dekojn da pecetoj. Sed ĝia interna muldaĵo estas kompleta, laŭ kiu oni povas restarigi la kranion. Escepte de la krania fundo kavigita pro ekstera premo, la originala formo de ĝiaj aliaj partoj kaj parto de ĝia supra makzelo kun dentoj jam povis esti viditaj post riparado.

Ĉar la kranio konservis relative kompletan internan muldaĵon, oni povas mezuri ĝian volumenon laŭ la restarigita kranio. Laŭ la ostoj ĉe la krania fundo oni povas difini la situon de la okcipitala truego kaj dedukti, ĉu Rama-pitekoj povis iri per la du piedoj. Tio estas ekstreme grava pruvo por decidi, ĉu Rama-pitekoj apartenas al la kategorio de homo aŭ tiu de simio.

LOKO DE FOSILIOJ

La gubernio Lufeng de Yunnan famiĝis tra la mondo kiel "Lando

de dinosaŭroj" pro abundo je dinosaŭraj fosilioj. La loko de fosilioj de Rama-pitekoj — la karbomejno Shihuiba situas sur montdeklivo norde de Lufeng je 110 kilometroj for de la ĉiam verda urbo Kunming en la okcidento. Malantaŭ la minejo estas montoj unuj super aliaj. Oriente de ĝi estas ravino, okcidente larĝa Xihe-rivero, sur la deklivo sidas la vilaĝo Shihuiba kie dense kreskas baŝooj (*Musa basjoo*) kaj filikofoliaj bambuoj — ĉarma sudlanda pejzaĝo.

La fosilia tereno longas je 100 metroj de oriente ĝis okcidente kaj larĝas je 50 metroj de sude ĝis norde. La tersurfaco estas malfru-perioda sedimento de ruĝa kaj flava sabla glueca grundo, sub kiu estas stratumo de la frua plioceno entenanta fosiliojn, konsistanta el brunaj karbotavoloj kaj grizaj sablaj tavoloj alterne unu sur alia. Kvankam la stratumo estas dika nur je 6-7 metroj, tamen ĝi entenas abunde fosiliojn de pitekantropoj, mamuloj kaj moluskoj.

Frue en la sesdekaj jaroj tiu "fosilia rezervejo" jam estis trovita, sed ĝi vekis atenton de paleoantropologoj nur en majo de 1975, kiam oni tie trovis la unuan denton de pitekantropo. De la vintro de tiu jaro la esplora taĉmento kune organizita de la Paleovertebrula kaj Paleoantropologia Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj la Yunnan-a Muzeo preskaŭ ĉiujare faris tie prifosadon kaj trovis multajn fosiliojn de Rama-pitekoj, Siva-pitekoj kaj mamuloj. Estas menciinde, ke en decembro de 1978, oni tie trovis relative kompletan kranion de Siva-piteko, kiu estas la unua krania fosilio el la fosilioj de diversspecaj pitekantropoj antaŭ 15,000,000-7,000,000 jaroj, ĝis tiam konataj de la mondo, kaj ĝuste pro tio ĝi vekis pli grandan atenton de en-kaj eksterlandaj fakuloj al tiu fosilia rezervejo.

Pli ĝojindan riĉrikolton oni akiris en la grandskala prifosado de la

26-a de oktobro ĝis la 14-a de decembro de 1980. Krom la supre menciita unua kranio de Rama-piteko, oni trovis pli ol dek supraĵoj kaj malsupraĵoj makzeloj kaj pli ol 100 dentojn de Rama-, kaj Siva-pitekoj, kaj grandan kvanton da animalaj fosilioj. Oni nun faras al ili riparon kaj esploradon.

SINTEZA ESPLORADO

Por koni la periodon kaj medion de la vivado de pitekantropoj kaj la rilaton inter tiuj kaj ilia aspekto, oni nun faras al la loko plurfakan sintezan esploradon. La unua esplorado pri la fosilioj de mamuloj trovitaj antaŭ du jaroj montris, ke ili apartenas al 34 specoj de animaloj inkluzive de tri-piedfingra ĉevalo, rinocero, kornotorda antilopo (*Antilospira*), sabro-denta tigro, elefanto, cervoj, gibono kaj aliaj. Komparante ilin kun animalaj fosilioj trovitaj en aliaj lokoj, oni konkludis, ke ili vivis antaŭ ĉ. 8,000,000 jaroj. La analizo de roka karaktero kaj sedimentaj kondiĉoj pri la stratumo de bruna karbo, kiu entenas la fosiliojn, geologia kaj geomorfologia esplorado ĉe la ĉirkaŭaj regionoj montris, ke en la viva periodo de pitekantropoj, Shihuiba situis ĉe la rando de lago kaj tie formiĝis sedimentaĵoj de rivero kaj lago. En la fosilia stratumo, precipe en la delikata sablotavolo troviĝas granda kvanto da fosilioj de etaj limneoj kaj malmulte da pli grandaj konkoj kaj malgrandaj fiŝdentoj. Ili helpas en esplorado de la tiama sedimenta medio.

Antera esplorado montris, ke la viva periodo de Lufeng-aj pitekantropoj apartenis al la tropika klimato de la suda Azio. La pitekantropoj vivis ĉe rando de arbaro, kie kreskis multaj ĉiamverdaj arbedoj, mirikoj, juglandarboj, avelarboj kaj aliaj.

La Ĉina Akademio de Sciencoj faros en Shihuiba plian prifosadon en la kuranta jaro kaj plie esploros ĝiajn ĉirkaŭajn regionojn.

El Leteroj de Niaj Legantoj

Mi estas via leganto de pluraj jaroj, sed abonanto ekde la monda enhavo de EPĈ. Malgraŭ longjara izoliteco kaj manko de via lando en la mondo, tio ne tro ĝenis konscion de la ordinaraĵoj, ke ĝi promesplene ekzistegas. Mi persone deziras ĉion plej bonan al ĉinaj homoj.

de **MARKO PETROVIC**
(Jugoslavio)

Estas tre ĝojinda kaj feliĉa afero ke la Ĉina Esperanto-Ligo fariĝis aliĝinta landa asocio de UEA. Pro tio ni en Eŭropo vere devas gratuli vin, ĉar mi kredas ke tio vere povas doni al la tutmonda Esperantomovado sanan kaj fortan puŝon antaŭen en la ĝusta direkto.

Leginte vian raporton pri la brila ekspozicio en Beihai — parko en Bejing, mi konvinkiĝis, ke vere diligente laboras la Ĉina Esperanto-Ligo, kaj tio multe ĝojigis nin esperantistojn.

de **J. H. ERIKSEN** (Danlando)

Jam depost pliaj jaroj mi abonis EPĈ, kaj ĝi ĉiujare pliboniĝis. En la komenco ĝi ŝajnis al mi iom naŭva kaj nematura, sed nun ĝi povas rivali kun la plej bonaj eŭropaj gazetoj.

de **HUGO LOFGREN** (Svedio)

... Ankaŭ dum nia ĉiumonata Verda Kafo, fariĝas 6-10-homa rondo, oni konstatas ke via bela revuo fariĝis vizitokarto vialanda, ne plu kvazaŭa politika bulteno.

de **G. O. VASKE** (Brazilo)

La enhavo estas tre varia kaj tre agrable ĝin legi. La eksteraĵo estas alloga kaj intima.

de **VLADO KOSEF** (Aŭstralio)

Jam antaŭe vi malkaŝe prezentis artikolon en via gazeto pri junaj deliktuloj, kaj nun "En Prizon de Ĉinio". Ili multe interesis min, kaj mi opinias, ke oni ne povas flankenlasi tiajn aferojn por pli bone kompreni fremdan landon. Mi elkore laŭdas kaj dankas vin por tiu kuraĝo.

Se vi iam havos okazon, traktu pri blindula vivo en via lando, ekz. pri profesio aŭ lerneja vivo, kia ekonomia cirkonstanco, kian helpon oni donas...

de **OZEKI TOYOTA** (Japanio)

Ĉinio estas tre granda agrokultura lando. Mi ŝatas pli da artikoloj pri la kamparana vivo kaj pri la agromoniaj esploroj.

de **A. CHARRAS** (Francio)

Mi tre ŝatas legi artikolojn pri Verda Majo. La Esp-a lingvo en la artikolo estas tre klara kaj facile legebla. La heroino Verda Majo estas vera esperantistino kaj granda homo.

de **GRAZYNA LASZCZAK**
(Pollando)

Mi ĉiam scivole legas pri geologiaj esploroj kaj arkeologiaj elfosoj — cetere scienca evoluo ĝenerale.

de **PERSSON MARTIN**
(Svedio)

Montru tre volonte plurajn murpentraĵojn, daŭrigu la fotojn pri naturaj belaĵoj fare de esperantistoj.

de **ENGLUND BERTIL**
(FR Germanio)

Karikaturo ne gravus al redaktoro, sed tre interesa al leganto. Momen- ton oni vidas ĝin, ridego eksplodas! Ĝi neniel manku.

de **OSAKI KAZUO**
(Japanio)

Mi ŝatas artikolojn en la rubriko "Historiaj Objektoj" pro ilia originaleco, unikeco, raveco kaj simpleco. Mi povas apogi nur la sugeston de s-ano Milorad Djurdjeviĉ pri enkonduko de konstanta rubriko pri Esp-movadaj novaĵoj. Eventuale vi povus plivastigi la bonhumorecajn spacojn. (Kelkaj el viaj "karikaturaj" estas juveloj.)

de **TADOLINI LUIGI**
(Italio)

Mi ŝatas legi precipe la popolrakontojn kaj novelojn, kaj artikolojn pri malnova literaturo.

de **CLAUDEL JEAN LOUIS**
(Francio)

Mi ŝatas artikolojn pri pentrarto. Bonvolu doni iom pli pri teoria fono kun ekzemploj. Tio estas lerninda. Mi ŝatas literaturaĵojn de Lusin, karakterizajn pecojn de liaj verkoj. Ĉu ankoraŭ ebla?

de **J. M. VAN DER HOEVEN**
(Nederlando)

La kovriloj montras detale fizi- omoniojn de vivaj homoj kaj la dorskovriloj montras naturan aŭ homfaritan belajn kaj ambaŭ specojn plaĉas al mi.

de **HENRIK WISSING**
(Danlando)

EPĈ estas facile komprenebla por ĉiu leganto. Ju pli la teksto estas komprenebla, des pli ĝi estos interesa al ĉiu.

de **RAKOTONDRAVAO**
(Madagaskaro)

Ĉiam mi multe ŝatis vian simplan stilon, la vortfaradon, la neuzadon de neologismoj. Mi ĉiam pro tio konsilas al la novbakitaj esperantistoj de mia klubo aboni EPĈ

de **ORSOLINI ANDREE**
(Belgio)



La danco "Konkuro pri Ŝafo"

NACIAJ KANTOJ K DANCOJ

Kantoj kaj dancoj de kazaĥoj

Fotoj de YAN JIN

En Ĉinio troviĝas pli ol 800,000 kazaĥoj, kiuj loĝas en Xinjiang, Qinghai kaj Gansu kaj okupiĝas ĉefe pri brutobredado.

Ili havas riĉan nacian kulturon kaj arton. Ili, serenaj, lertas en kantado kaj dancado. Iliaj kantoj kaj melodioj estas tre belaj.

La danco "En Luna Nokto"




Kantado en akompano de dombroj, naciaj muzikiloj de kazaĥoj






Gojo (Olepenrajo)
de LU KAI



Pentraĵoj de gejunuloj

Aspiro (Olepentraĵo)
de AI XUAN




Mateno (Olepentraĵo)
de WANG GUOJUN

Sur Montpinto (Olepentraĵo)

de ZENG XIAOFEN


Aŭtuno de Montaro (Olepentraĵo)
de ZHANG YING



Bildoj el ŝtofpecoj

Tiaj bildoj estis faritaj el diversaj ŝtofpecoj gluitaj.

Sunleviĝo en Vintro
de HANG FAJI



Vesperigo
de CHEN MIN

